Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Novembro-Decembro 2018 | n-ro 11-12 (1361-1362)


# Sennaciulo

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Solidare ni batalu




Kiam monda proletaro ekbatalos unuiĝe,
Tiam kreskos forto nia plej rapide kaj efike;
Tre facila predo estas homo sole, senamike,
Sed ni kune estas fort'.

Solidare ni batalu,
Solidaraj estu ni, nun;
Solidare ni batalu ĉar
Unuiĝo estas fort' !

Kion ni komunan havas kun rabema parazito,
Kiu nin subpremi volas servutige por profito ?
Kion fari do krom ope ekribeli sen hezito ?
Jam ekkreskas nia fort'.

Solidare ni batalu...

Ni kulturis ĉiujn kampojn, ni konstruis ĉiujn urbojn,
Ni vicigis relojn mile kvankam multis la perturboj;
Nun ni staras malsatante dum diboĉas ili burĝoj,
Sed uzeblas nia fort'.

Solidare ni batalu...

La nenifarantoj reĝas super tuta tero nia,
Sed konstruis ĝin entute ni al verko ja genia,
En ĝi ni ne sklave vivos sed ĝin regos kune kiam
Unuiĝos nia fort'.

Solidare ni batalu...

Milionojn ili gajnis sed neniom propraŝvite,
Eĉ ne unu rad' moviĝus se ni starus brakplektite
La liberon ni akiros se ni kune ne plu splite
Unuiĝos en akord'.

Solidare ni batalu...

Da potenco estas pli en niaj manoj ol en or'
Kaj ol en la plej terura armehava diktator';
Ni socion novan naskos el kapitalismo por
Mond' sen klasoj, sen perfort'.

Solidare ni batalu,
Solidaraj estu ni, nun;
Solidare ni batalu nun
Por socialisma ord' !

Kanzono verkita de aktivulo el la movado ILM (Industriaj Laboristoj de la Mondo) [1] Ĉaplino-Ralfo [2] en 1915, parodianta la usonan *Batalhimnon de la Respubliko* [3], laŭ la melodio do de *La korpo de Broŭn-Ĝon'* [4].

Laŭfame ĝi estus la dua plej konata kaj kantata proletara kanzono post *La Internacio*.

Originala titolo : *Solidarity Forever*
Tradukis : Vito Markovo kaj Gario Miklo (2009)



Ralph Chaplin

**Notoj:**
[1] IWW (Industrial Workers of the World)
[2] Ralph Chaplin
[3] The Battle Hymn of the Republic
[4] John Brown's Body

## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen la lasta numero de Sennaciulo el la jarkolekto 2018. La felietono pri fuŝa uzo de malnova adreslisto daŭras, malgraŭ ripetaj provoj solvi tion, do atendante, nepre vi memorigu ĉirkaŭ vi, ke eblas ricevi retan version de Sennaciulo sciigante vian retadreson al sennaciulo.redaktejo @gmail.com.

En tiu ĉi numero aperas pliaj informoj pri la venontjara SAT-kongreso en Barcelono. Jam aliĝis 33 partoprenontoj, kaj la organizantoj ŝatus ke tiu nombro kresku ĝis 75 je la mezo de januaro, ĉar ili devos tiam antaŭpagi la duonon de la luprezo por la kongresejo. Do, se vi havas la eblon tuj aliĝi kaj antaŭpagi vian restadon, ne hezitu tion fari kiel eble plej rapide. Tio helpos ilin.

Plu pri kongresoj, vi sciu ke la PK rezignis pri pluaj preparlaboroj por ebla kongreso en Lesjöförs, Svedio, en 2020. Kamarado el SLEA atentigis, ke la ĉefa motoro de la Esperanto-domo en Lesjöförs esprimis opiniojn pri islamanoj, kiuj estas taksitaj ŝoke rasismaj eĉ ene de la sveda naciisma partio. Do en tiaj cirkonstancoj ne eblus utiligi la kongreson por plifortigi la ligojn kun la SLEA-anoj. Jen do plia, ĉi-foje ege konkreta, manifestiĝo de situacio, pri kiu estas lastatempe multaj debatoj en Sennaciulo, plej laste en paĝoj 22-23 de la nuna numero. Rezulte, nun estas bezonata serioza alternativa propono por 2020.

Agrablan legadon kaj feliĉan novjaron deziras al vi

La redaktoskipo

**Frontpaĝa bildo**

Verko kolektive kreata de popolanoj el la vilaĝeto El Berrueco (Hispanio) por ornami publikan spacon.
Foto farita de Pedro Sanz.

# Enhavo


### Monda paco
4 Paroli pri paco apogas la pacon!
5 Por komune paca kunvivado
6 Atom-armiloj – tio estas skandalo
### Tra la mondo - Kurdio
7 "Mi vidis la socian modelon plej reakcian kaj malican"
### Tra la mondo - Japanio
9 Pereanta Japanio
### Sindikatismo tutmonda
12 Libereco por Shen Meng Yu
13 Turkio
### Medio
14 Ekologia konstruado en Afriko
16 Danĝerego de la nuklea centralo Tomari
18 Kio okazas al nukleaj centraloj en Japanio?
### Historio
20 En 1833, romano kiu estas historia atestaĵo
21 Septembre, surstrate tra la mondo
### Intelekta memdefendo
22 Pri epistemologio
### Liberecana Frakcio
24 Recenzo pri Anarkio
### Nekrologo
27 Renata CHASSARD CAUBEL
### El la SAT-Administrejo
27 Novaj aliĝoj
### 92a SAT-kongreso
28 Mia liriko kaj la muziko
28 Kooperative kaj esperante en Porto!
29 Can Masdeu
32 Pri la kongresejo
### SAT-anoj aktivas
23 Vizito de la unua E-delegacio al CIRA (*)
31 Kunsido de SAT-anoj en Koreio
31 SAT-kunsido en Japanio
### El la SAT-Administrejo
30 Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***



# Paroli pri paco apogas la pacon!

## Vortokadroj stiras niajn pensojn aŭ al milito aŭ al paco

Kiu el vi en la salono volas pacon? – Ĉiu. Kiu el vi volas militon? – Neniu.

Vidu, neniu el ni volas militon, ĉiu volas la pacon.

Sed *ne ĉiuj homoj volas la pacon*, kiel ni. Ĉu vi ne kredas tion? – Se vi ne kredas, ke ekzistas homoj, kiuj ne volas pacon, mi demandas vin: Kial oni produktas armilojn? – Vi respondos: Por defendi nin.

Vidu, nun ni jam estas ĉe nia temo.

*Ni estas viktimoj de trompo*. Tiuj, kiuj volas ke okazu militoj, kaŝas siajn intencojn, ili ne parolas pri milito, sed pri defendo.

Sed *kial iuj homoj deziras militon*? – por profito. La armilproduktado kaj la armilkomerco estas lukra, ĝi donas gigantan profiton. Ĉar armiloj estas multekostaj. Iliaj produktantoj gajnas multan monon. La armilindustrio lukras grandajn sumojn, kiujn pagas la viktimoj per sia vivo.

*Neniu milito povas okazi sen militpropagando*. Vidu, en ĉi tiu salono estas neniu, kiu volas militon. Do vi povus pensi, ke la militpropagando ĉe ni ne havas iun ŝancon. – Sed la malo veras. Fakte la armilarlobio atingas sian celon. Ĉar ni ne rimarkas la trukon de la propagando. La lobio de la armarigo ja ne plumpe varbas por milito, sed nur por la "defendo". Sed nun, kiam la fuĝintoj for de la milito atingis nian landon, ni ekmiris: Kial do ili fuĝas al ni? Kia estas la truko de la militpropagando, ke ni ne rimarkas ĝian celon, kvankam ni ne volas militojn? *Kiamaniere ni lasas nin trompi*?

Por kompreni tiun trukon de la militpropagando, nuntempe ni povas uzi la ekkonojn de la moderna kognoscienco – kiu baziĝas sur la neŭrologio – respektive de la *neŭro-lingvistiko*.

Neŭrologio nomiĝas la scienco, kiu esploras la cerbon. La scienco, kiu esploras lingvojn, nomiĝas lingvistiko. La kombino de ambaŭ estas la neŭrolingvistiko. Kiamaniere tiuj esploroj helpas al ni *kompreni la trukojn* de la militpropagando? Mi klarigas tion je kvin paŝoj.

Unue: Nuntempe eblas *observi la cerbon dum ties aktivado*, dum nia pensado. Neŭronoj nomiĝas la sinapsoj, kie ligiĝas la nervoj. Dum la sinapsoj aktivas, per la bildodona tekniko oni povas vidi lumon sur la bildo de la cerbo. Kiam mi diras ekzemple la vorton "konflikto", la sciencisto vidas sur la bildodona ekrano, kie en la cerbo aperas lumado. Tiamaniere la esploristo povas vidi, kiuj vortoj en la cerbo estas ligitaj, formas signifokombinon.

Due: Estas konata fakto, ke *muskolo ofte uzata kreskas*. Inverse muskolo, kiu neniam estas uzata, ŝrumpas, ĝis ĝi fine malaperos. Ĉiu muskolo estas reprezentata en nia cerbo. Per muskoloj ni ekzemple kuras. Kaj per vortoj ni pensas. Ankaŭ *ĉiuj vortoj estas reprezentataj en nia cerbo*. Je vortoj okazas la samo en nia cerbo kiel je muskoloj: la spaco por prezenti muskolon per sinapsoj en la cerbo kreskas per ekzercado kaj ŝrumpas per neekzercado.

Trie: Kiel jam dirite, vortoj ekzistas en nia cerbo ne izolite, sed en kunteksto, do ligite kun aliaj vortoj. La neŭrologia lingvistiko parolas pri *signifokadro de vorto* (ankaŭ nomataj framo, angle "frame"). Se vi ekzemple aŭdas aŭ diras la vorton "floro", vi pensas ankaŭ pri koloroj, pri odoroj, eble pri la somero, aŭ pri festoj, pri ĝojo kaj tiel plu. La simpla eldiro de *vorto vekas en mi miajn spertojn kolektitajn dum mia vivo* rilate al tiu ĉi vorto. Ĉe universitata profesoro okazas tio same kiel ĉe bazlernejano. *Ni ĉiuj ne povas eskapi tiun efikon de la signifokadro*. Eĉ se mi diras: Ne pensu pri floro, vi pensos pri floro. Ĉu vi ne kredas? Tiam ni eksperimentu: Mi diras: Ne pensu nun pri bunta elefanto! – Kio okazis? Vi pensis pri bunta elefanto! La vorteton "ne" la cerbo neglektas.

Kvare: Tiu *signifokadro de vorto*, kvazaŭ ĉirkaŭaĵo aŭ pejzaĝo de la koncerna vorto, *inkludas parencajn aŭ ligitajn vortsignifojn*. Kaj aliajn vortojn, kies signifo ne estas ligita aŭ parenca, la signifokadro *ekskludas*. Ene de tiu signifokadro estas signife parencaj, ligitaj vortoj kaj ekster *tiu signifokadro estas vortoj, kies signifo ne rilatas al la koncerna vortsignifo*. Ekster la signifokadro de la vorto floro ekzemple estas vortoj kiel neĝo aŭ polvo aŭ malhelo kaj tiel plu.

Kvine: Kiel dirite, el la signifokadro ni ne kapablas eskapi. Se mi uzas *falsajn vortojn*, tiuj estas *vortoj kun ne intencitaj signifokadroj*, mi *elvokas falsajn, ne intencitajn pensojn*. Por preni alian ekzemplon: Se ni parolas pri "impostfuĝado", ni neeviteble pensas pri kompatinda fuĝanto, kiun persekutas iu malamiko. En la signifokadro de la vorto impost*fuĝado* la ŝtato estas malbona, ĉar ĝi "persekutas", kaj la monkaŝanto estas kompatinda, ĉar li aŭ ŝi devas "fuĝi". Inkludita en la vortokadro "fuĝanto" estas la signifo "kompatinda". Ekskludite estas, ke la imposto estas necesa por la funkciado de la ŝtato. Imposto estas kontribuo de ĉiuj monhavantaj ŝtatmembroj por komune financi la necesajn servojn de la ŝtato por la bonfarto de la membroj. La ŝtato meritas empation, la monkaŝanto riproĉon, ne inverse, kiel sugestas la falsa vorto. La monkaŝanto estas "*imposttrompulo*" aŭ "*impostŝtelanto*".

Vortoj gvidas niajn pensojn. Per vortoj ni pensas.

Nun ni revenas al la vortoj "*paco*" kaj "*milito*". Kiun el la du vortoj ni pli ofte uzas? – Bedaŭrinde la vorton milito aŭ vortojn el ĝia signifokadro. Do ne malkaŝe, sed kaŝe ni ofte parolas pri milito per la vortoj "teroro", "teroristoj", "minacado", "defendi",

"sekureco" kaj tiel plu.

La ministerio, kiu okupiĝas pri militaj kaj armeaj aferoj oni iam nomis militministerio. Hodiaŭ ne plu. Kial? Ĉar ni ne volas militon. Oni nomas nun la saman ministerion "defendministerio". Sed se ni parolas pri defendministerio la efiko de la signifokadro tamen vekas en nia cerbo bildojn de milito. Kial? Ĉar defendo apartenas al la signifokadro de atako. Sen atako ja ne necesus defendo.

La *ofta ripeto de la vorto teroristoj* pligrandigas en nia cerbo la reprezentadon de la signifokadro "danĝero", kvankam ni vivas en unu el la plej sekuraj landoj de la mondo. Tiuj, kiuj volas, ke ni multe pli da mono elspezu por armiloj, devas daŭre paroli pri teroristoj kaj danĝero. En niaj cerboj la spaco por militrilataj signifokadroj estas superproporcie granda. Nia kapo pleniĝas de pensoj pri "danĝero". La rilato al la realo perdiĝas. La armilproduktantoj ĝojas.

Nun aperas la demando: *Ĉu entute eblas pensi nian mondon sen la kategorio "malamikoj"*?

Kiam Sovetunio kolapsis, Miĥail Gorbaĉov parolis pri la neceso *konstrui komunan eŭropan domon*. Tio estas bildo en la signifokadro de paco. Gorbaĉov havis vizion pri paca Eŭropo. Estis armeanoj, kiuj puĉis kontraŭ Gorbaĉov, ĉar ili ne eltenis pensi pri paca mondo. Kaj estis la NATO, okcidenta "defend"pakto, kiu male al sia promeso ŝovis la limon de la teritorio de sia pakto ĝis la "dompordo" de Rusio.

Ni povus en niaj politikaj konversacioj pli pace paroli pri nia mondo kaj niaj kunloĝantoj sur la Tero, ol ni kutimas. Ni povus uzi pacajn metaforojn anstataŭ militajn. Kunloĝantoj, najbaroj, kunhomoj, partneroj anstataŭ fremduloj, malamikoj, rivaloj. *Najbareco* ekzemple estas vorto, kies signifokadro estas pacrilata. Pri kio ni daŭre parolas, tio kreskas en nia cerbo kvazaŭ al giganta superdimensia "muskolo", tiel ke ni fine ne plu povas normale iri. Senmetafore dirite: *Ni parolas tiom multe en terminoj de milito, danĝero kaj defendo, ĝis kiam ni ne plu povas pensi pri paco*.

Kiel eskapi la trompojn de la "cerbolavado" per la militemaj informinundoj? Ni povas lerni "*brosi ĉiujn mesaĝojn kontraŭ la felo*", por uzi germanan parolturnon. Lerni kritikajn demandojn. Kiujn *kritikajn demandojn*? Ekzemple:

– Al kiu utilas ĉi tiu informo?

– Kiujn aliajn informojn ĉi tiu mesaĝo prisilentas?

– Kiujn sentimentojn ĉi tiu mesaĝo nutras kaj por kiu celo?

Juĝisto en juĝejo obeas al la regulo: *Aŭskultu ankaŭ la alian flankon*.

Komence la interreto promesis *senliman aliron al la informoj de la mondo*. Sed ekde la jaro 2008 ĉiu el ni en guglosercado ricevas alian respondon. Al la sama demando la serĉmaŝinoj selektas tiujn respondojn, kiuj kongruas al la interesoj de la serĉanto. La serĉmaŝino konas ties interesojn per ties ĝistiamaj demandoj, ties adreson, ties aĝon, ties aĉetkutimojn, ties politikajn opiniojn kaj tiel plu.

Ni havas la tendencon *vivi en la propra "filtroveziko"*, tio signifas, ke mi ricevas nur tiujn mesaĝojn, kiuj plaĉas al mi. Por liberigi min el tiu danĝero, helpas, se mi serĉas la informojn de amaskomunikiloj malsamideanaj. Se iu parolas aŭ skribas *kontraŭ miaj konvinkoj*, mi povas serĉi informojn pri la fono de tiu opinio.

Ni nun scias, ke *per vortoj ni estas manipuleblaj*. Ni ankaŭ scias, ke *kontraŭproduktive estas ripeti la vortojn de la malsamopiniantoj*. Ĉar per la ripetado ni kontraŭvole nur pligrandigas la reprezentadon de tiuj vortoj kaj pensoj en la cerboj, kiujn ni ne volas pligrandigi. La vorteton "ne" nia cerbo simple neglektas.

Ni povas pligrandigi la spacon en nia cerbo por pacaj vortoj kaj pensoj. Pri kio ni parolas, tion ni apogas. Ni povas apogi la pacon per pacaj paroloj.

Mi finas per teksto el la literaturo de la juda saĝotradicio:

Gardu viajn pensojn,<br>ĉar ili fariĝos vortoj.<br>Gardu viajn vortojn,<br>ĉar ili fariĝos faroj.<br>Gardu viajn farojn,<br>ĉar ili fariĝos kutimoj.<br>Gardu viajn kutimojn,<br>ĉar ili fariĝos via karaktero.<br>Gardu vian karakteron,<br>ĉar ĝi fariĝos via sorto.

Nia sorto estu *la paco tutmonda*. Ni gardu la vortojn, kiujn ni uzas.

ALOIS EDER, 2.6.2017

*(Prelego dum la Germana Esperanto-Kongreso 2017 en Freiburg)*

# Por komune paca kunvivado

En *Wismar* [vismar], en la preĝejo de la Sankta Spirito *Heiligen-Geist-Kirche* partoprenis komune 250 kristanoj, mahometanoj kaj ateistoj kunan politikan preĝadon. Ili recitis tekstojn el la Biblio, la Korano kaj la Deklaracio de Homaj Rajtoj.

La ĉefa celo de la renkontiĝo estis la deziro de loĝantoj el la urbo *Wismar* kune vivi en paco kaj harmonio.

"Perforto, manko de respekto kaj ĉiutaga rasismo ne havas lokon en nia urbo" deklaris la urbestro Thomas Beyer [Tomas Bajer]. "En nia urbo nuntempe loĝas homoj el diversaj mondregionoj, kulturoj, kun malsamaj haŭtkoloroj kaj religioj. Por ĉiuj validas la samaj leĝaro kaj reguloj de konduto. Ĉiu homo devus tion akcepti."

La politika vespera preĝado estas inaŭguro por pliaj eventoj en la urbo *Wismar*. La kialo por tiaj publikaj manifestacioj estis la refoja kruela interbatado en la kvartalo kun nomo *Friedenshof* (paca korto). Laŭ raporto de la loka polico la motivo estis ksenofobia.

Artikolo el la gazeto *Ostsee-Zeitung* (Gazeto de la Balta Maro), 6-an de septembro 2018.

Ruĝ-gefrate

DIETER ROOKE



### Intervjuo al Beatrice Fihn

# Atom-armiloj – tio estas skandalo

**Indignas s-ino Beatrice Fihn, estro de tutmonda kampanjo kontraŭ atom-armiloj, kies sidejo estas en Ĝenevo, Svislando.**

**Markus Haefliger**: La svisa registaro ne subskribos la traktaton por malpermeso de atom-armiloj. Kiel vi reagas?

**Beatrice Fihn**: Mi estas ege ŝokita. Svislando kiel sidejo de malarmado, Ruĝa Kruco, internacia juro de humaneco ja devus kontraŭstari la atom-armilaron. Sed ĝi decidis por amas-detruiloj. Ĝi, ekzemple, agnoskas legitimecon por la ŝtatoj Usono kaj Norda Koreio. Nekredebla!

**MH**: Kiel vi klarigis la decidon?

**BF**: La ŝtatoj kun atom-armilaro provis per minacoj kaj ekonomiaj rimedoj influi la decidon. Kial ni defendu la diktatorajn reĝimojn de Trump kaj Putin?

**MH**: Kial la ŝtatoj kun atom-armilaro provas malebligi la traktaton?

**BF**: Ili konsciiĝis, ke la traktato havos efikon. Tial ili provas malebligi la aliĝon de 50 ŝtatoj.

**MH**: Ĉu la traktato estas nur simbola politiko? Neniu havas la povon devigi ŝtatojn rezigni pri atom-armiloj.

**BF**: Bv. rigardi la staton de la biologia kaj kemia armilaroj: neniu ŝtato esprimas sin favore al ilia apliko. Kial? Ĉar ili estas deklaritaj kontraŭ-humanecaj per internaciaj traktatoj. Kiam armilo estas deklarita kontraŭ-humana, kontraŭ-leĝa, tiam ĝi perdas siajn forton kaj efikon. La nova traktato apelacias al la tutmonda homaro. Tiuj atom-ŝtatoj perdos kredindecon, ili staros sur malĝusta juro, sur malĝusta moralo.

**MH**: Ankaŭ la svisa registaro deziregas mondon sen atom-armiloj. Sed ĝi opinias jam sufiĉe efika la traktaton el la jaro 1968. Tial ne necesus nova traktato.

**BF**: Tiu argumento jam estis refutita de juristoj, de UN, IKRK (Ruĝa Kruco). La du traktatoj komplementos sin. La nova traktato deklaros la atom-armilojn kontraŭleĝaj, tiel ĝi konkrete vastigos la aplikon.

**MH**: La svisa registaro diris, ke la malarmado eblas nur en konsento de la grand-potenculoj – sed ne kontraŭ ili.

**BF**: Vi konsideru: ĉu Svislando ne subskribu la Traktaton pri Homaj Rajtoj, ĉar Saud-Arabio ne plenumus ĝin? Por politika interparolo kun grandaj potencoj necesas tribuno internacia kun normoj internaciaj. Kiu ŝtato rifuzas subskribi la traktaton kontraŭ atom-armilaro, tiu ŝtato legitimas la atom-bombon.

**MH**: La nana Svislando ne gravas en la mondo.

**BF**: Ju pli da landoj levas sian voĉon kontraŭ tiaj amas-murdiloj, des pli grandas la efiko. Svislando, lulilo de la Ruĝa Kruco, hejmo de la internacia juro de humaneco, donas pli da prestiĝo por nia iniciato. Se Svislando starus ĉeflanke de grandpotencoj, ĝi perdus sian vizaĝon.

**MH**: La svisa registaro argumentas, ke Svislando profitas pro protekto de nordatlantika pakto NATO.

**BF**: Tiu aserto ege ŝokas min. Ĉu Svislando esperas, ke iu ĵetos atom-bombojn por protekti la loĝantaron? Ĉu favore al svisoj ie-tie mortu homoj en Moskvo, Pekino ktp? Mi esperas, ke la svisa popolo ne konsentas.

**MH**: 122 ŝtatoj esprimis sian konsenton por malpermeso de atom-armiloj. Sed ĝis nun nur 14 ŝtatoj ratifis ĝin. Tio estas tre malmulte...

**BF**: Por la procezo necesas longa tempo. Ni kredas, ke ĝis la fino de la jaro 2019 aliĝos la minimumo de 50 ŝtatoj.

**MH**: Via organizaĵo ICAN, Nobel-premiito pri la paco, sidejas en Ĝenevo. Ĉu vi planas translokiĝi?

**BF**: Ni kredas, ke Ĝenevo estas la plej digna loko, urbo de malarmado, de internacia juro de humaneco. La decido de la svisa registaro estos renversebla. Ni diskutos kun parlamentanoj, reprezentantoj de la Ruĝa Kruco, la papo kaj eklezioj.

**MH**: Ĉu per via klopodado vi ankaŭ kalkulas je la prestiĝo de la Nobel-premio pri la paco?

**BF**: Ne gravas nur la premio, sed la majoritato de la landoj sur nia terglobo, de UN, de la papo kaj eklezioj, de la tutmonda civila socio. La portempa decido de la svislanda registaro estas erara vojo.

*Tradukis:* Dieter Rooke
*Fonto: svisa gazeto* Der Bund *(2018-08-18)*



**Beatrice Fihn**

## Intervjuo al Davide Grasso

# “Mi vidis la socian modelon plej reakcian kaj malican”

## Davide Grasso. Eksmilicano de la PPT [1]

**La sistemon, kiun starigis la Islama Ŝtato en Sirio kaj Irako, plej suferis la virinoj, “ĉar por ili la subpremado estis totala”. La viroj devis “nur konformiĝi”.**

Davide Grasso (Kuneo, Italio, 1980) konsideras sin parto de la tiel nomata Erasmus-generacio: “Dum nia tuta vivo, ni ofte ŝanĝas nian landon, lernejon, lingvon kaj laboron; do ni scias, kiel gravas interŝanĝi kaj superi nian pensmanieron; tiu pensmaniero povas enhavi fidon, sed nepre oni devas esti preta ekdubi”. Grandan influon havis en lia socia kaj humanisma disvolviĝo la luktoj kontraŭ la GRT [2] en la Valo de Suso [3] en Italio. Iam, li decidis surpreni aliajn sindevontigojn, kaj li eniĝis la kurdan milicon PPT kiel internacia batalanto. Reveninte en Eŭropon, li kolektis siajn spertojn kaj meditojn en libro titolita *Hevalen* [4], eldonita de *Edizioni Alegre*.



**Kial vi decidis aniĝi en la kurda milico PPT?**

Laŭ tio, kion mi sciis, la PLK [5] kaj la PPT alfrontis la atakon de la Islama Ŝtato, kaj ne la siria nek la iraka armeoj. Ege ĉagrenis min, ke la amaskomunikila cenzuro komparis miajn batalkamaradojn kaj la IŜ-anojn, sed ankaŭ mi furiozis kontraŭ mi mem, pro mia konsciencomanko. Mi sentis la bezonon stari subtene al revolucio, despli en nia epoko. Tia bezono difinas, kiuj volas vere konstrui pli bonan mondon kaj kiuj ne.

**Kion vi renkontis dum vi estis batalanta?**

Mi vidis la socian modelon plej reakcian kaj malican, kiun oni povas imagi, konkretigita de la IŜ, kolizianta kun la socipolitika modelo plej progresema en la mondo. Tiu ĉi alia modelo baziĝas sur la komunuma memorganizado kaj la plena kunpartopreno de la virinoj. Tiun modelon oni defendas en Roĵavo kaj Suda Kurdio [6]. De multaj jaroj neniu liberig-movado proponis konstrui komunuman socion.

**Kelkaj maldekstraj amaskomunikiloj aŭ, tiel nomataj alternativaj, kritikas la kurdojn pro ties aliancoj.**

Fundamente, la oficiala informado devas teni subpremadsistemon, kaj la konsekvenco de tio estas defio kontraŭ tia speco de informado; la kurda movado estas ekzemplo de tio. La kontraŭimperiisma vidpunkto estas tre malriĉigita, kaŭze de tiuj, kiuj konsideras sin ties interpretantoj. La dogmeco kaj la socialismo ne povas kuniri. La farataj interpretoj flankenlasas la bezonojn kaj interesojn de la socia amaso, favore al konjunkturaj kaj oportunismaj konsideroj ligitaj al la geopolitiko. La opinioj, kiujn ni havas pri socia kunfrontado en iuj nacioj, devas flankenlasi la konfliktojn inter la subpremantaj klasoj de kiu ajn nacio. Ni vivas en mondo de tutmondiga kapitalo, en mondo de tutmondigaj luktoj, ne dum la Malvarma Milito; nun, klare videblas, kiel la tiamaj *sovetanoj*, tiuj, kiuj subtenis la liberigintojn de Saigono, lasis la partizanojn defendintajn Afrinon en la manoj de la turka islamfaŝismo.

**La PPT-milico havas “malkomfortan aliancon” kun Usono. Kion vi klarigus pri tio?**

En la nordo de Sirio la PPT estas forto socialisma kaj partizana, kaj ĝi profitis, ke Usono agadis kontraŭ la sama malamiko. Ĝuste tiel same ĝi faris kun Rusio okcidente de la rivero Eŭfrato, kaj, kelkfoje, ankaŭ estis milita kunordigado kun la reĝimo de Damasko. Oni devige estas ene de historiaj kontraŭdiroj, kaj oni devas aliri konkludojn, por plifortigi la revoluciajn poziciojn laŭ tiu aŭ alia maniero. Tion ni ŝuldas al la popolo, kiun ni devas defendi. Kiu agas ĉiam devas preni pragmatajn elektojn.

**Ŝajne, la demokrata konfederacismo de Roĵavo ĝenas al ĉiuj kunfrontiĝantaj interesoj. La revolucio en norda Sirio estas la nura ekzemplo, kiu havas alian direkton.**

Ĝuste tiel, turni la dorson al tiu revolucio signifas: komplici kun la reakcia politiko de Usono – kaj de




Saŭdarabio, Rusio, Irano, Israelo... – Fakte, kvankam povus esti malsamecoj inter iliaj subordiglogikoj, ili havas komunan intereson: detrui ĉiun ajn veran revolucion.

**Laŭ viaj vortoj, kiam oni liberigas vilaĝon el la IŜ: "subite, ĉiuj ekfumis, ĉar tio estis malpermesata dum du jaroj kaj duono".**

Vere, tio estis mia unua impreso: oni terure avidis akiri cigaredojn, ĉar sub la regado de la Islama Ŝtato ĝi estis malpermesata. Krome, oni parolis al mi pri la nepagebla impostosistemo kaj pri la senĉesa fanfaronado de la IŜ-funkciuloj kaj policistoj. Ĉiamaniere, kio plej cerbumigis min estis la diraĵo de virino, kiun oni persekutis dum jaroj: vivi sub la IŜ malfacilis por la viroj, sed elteneblis. Ili nur devis konformiĝi, lerni malmultajn kaj klarajn regulojn kaj kutimiĝi al la ĉiutaga perforto.

**Kaj kiu alia konsekvenco estis por la virinoj vivi sub la IŜ?**

Tiun teruradon suferis plej multe la inoj. La edzinoj, patrinoj, fratinoj kaj filinoj vidis, kiel oni transdonas al la viroj la tutan povon super la familio; nenecese paroli pri la enkarcerigitaj virinoj nek pri la seks-sklavinoj – ofte infaninoj –. La cigaredoj ne estis la unua problemo por la liberigitaj inoj, ĉar ili estis suferintaj enkarne absolutan koloniigadon.

**Kial la IŜ havis tian sukceson rekrutante junulojn en Sirio kaj Irako?**

Ofte, ĝi iel sin trudas, rekte aŭ subtile. Dum la IŜ okupaciis Minbiĝon [7] kaj Rakahon [8], la junuloj estis devigataj servi la emiron kaj batali. Alia afero estas rilate Irakon, ĉar estis nenormalaj okazintaĵoj depost Usono forlasis la landon en 2011: la ŝijaistaj partioj, aliancanoj de Irano, koloniigis la sunaistojn, humiligis ilin, kaj ties protestojn sange sufokis. Estis ekstrema decido peti protekton al la IŜ-milicanoj. Ne temas pri ekskuzo, sed certe oni devas tion konsideri por ĉion kompreni.

**Kaj kio rilate la eksterlandajn batalantojn?**

La motivigo de la eŭropanoj, kiuj aliĝis al la IŜ, estas multe pli simpla: stulteco, ĉu ili estas arabdevenaj aŭ ne. La stultecon, kiel mezureblan econ, oni ne devas subtaksi; mi parolas pri la stulteco disvastiĝinta en la socio, tiu, kiu ofte kondiĉas la decidojn de la personoj. Unu sola trajto ligas ilin: ilia nekapablo trovi sian lokon en la mondo. Foje, povas esti tre dogmeca pri ĉio kulpigi la "sociajn kaŭzojn"; ezkistas subjektiva variablo, vere individua.

J.M. ARRUGAETA
*kaj*
ORSOLA CASAGRANDE

*Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 17-an de Aprilo 2018-a.*
*Tradukis: NXC (oktobro 2018-a).*

**Notoj** (nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj):

[1] Popolaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Gel).
[2] Grand-Rapida Trajno.
[3] Vâl Susa en la arpitana. Val Susa en la okcitana.
[4] Kamaradoj.
[5] Partio de la Laboristoj de Kurdio (PLK)/Partiya Karkerên Kurdistan (PKK).
[6] Suda Kurdio/Bashurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Iraka ŝtato.
[7] Minbic. Manbij, en la araba.
[8] al-Raqqah, en la araba.



# Pereanta Japanio

Mi sentas, ke Japanio estas pereanta. Lastatempe, multe okazis katastrofoj en la tuta Japanio.


Komenciĝo estis tertremo de la 10a de junio en mia gubernio Gunma. Kiam mi ĉeestis en la Kunsido de Patrinoj en la urbo Maebaŝi, subite aŭdiĝis obtuza bruo. Tiun momenton mi ne komprenis, kio okazis, sed ĝi estis tertremo de tremgrado 5. Mia gubernio situas 100 kilometrojn nordokcidente de Tokio, en la mezo de la japana insularo, kaj ni ĉiuj loĝantoj kredis, ke ne okazos seriozaj katastrofoj en Gunma; tial tiu tertremo en nia gubernio surprizis nin. Kvankam ĝi estis relative granda, neniuj damaĝoj estis raportitaj.



Lerneja muro falinta

## Tertremego en Osako

La sekva vera katastrofo okazis matene la 18an de junio en Osako, la trie plej granda urbo en Japanio, en la okcidenta Japanio. La forteco estis magnitudo 6,1. En tiu ĉi tertremo mortis 5 homoj, el kiuj kazoj la plej trista estis morto de 10-jarulino. Vizitonte la lernejon, ŝi hazarde estis apud la lerneja muro, kaj ĝia supra parto 1,5 metrojn alta falis sur ŝin. Tiu muro estis konstruita ne laŭleĝe. Oni jam avertis pri la danĝereco de tiu muro, sed la eduka komitato neglektis tiun averton. En tiu tertremo detruiĝis preskaŭ 7000 domoj.




## Pluvego en la okcidenta Japanio

La sekva pli serioza katastrofo okazis en la okcidentaj gubernioj. Ekde la 28a de junio ĝis la 8a de julio multege pluvis.

En 12 gubernioj mortis entute 220 homoj kaj malaperis 12 homoj, kaj

6500 domoj estis tute aŭ duone detruitaj kaj 35000 domoj estis inunditaj.

Inter tiuj gubernioj, Okajama, Hiroŝima kaj Ehime estis plej serioze damaĝitaj. En Okajama 27% de la distrikto Mabi de la urbo Kuraŝiki estis inunditaj pro detruiĝo de digoj de du apudaj riveroj kaj 4700 domoj estis damaĝitaj. En Okajama 61 homoj mortis kaj 3 homoj malaperis (antaŭ la 22a de julio).

En Hiroŝima okazis 5064 terfaloj en la urboj Higaŝi-Hiroŝima, Kure, Mihara kaj aliaj, kiuj mortigis 107 homojn kaj malaperigis 7. Rokoj kaj sablo falis el la granitaj montetoj, kaj detruis domojn aŭ kovris tiujn ĝis la tegmento. Tiuj domoj plenaj de sablo estos ne ripareblaj.

En la gubernio Ehime la rivero Hiĵi-kaŭa inundis la urbon Oozu kaj mortigis 26 homojn kaj malaperigis 2.

Multaj homoj nun provizore loĝas en gimnastikejoj kaj distriktaj kunvenejoj, sed en varmega vetero la vivo en tiu malbona stato estas malfacila, kaj certe ekestos mortintoj pro malbonaj vivkondiĉoj kaj malespero.



Inundoj en la urbo Kuraŝiki



Enterigitaj aŭtomobiloj sur la nacia vojo

## Varmego atakis la tutan Japanion

Post la pluvego atakis Japanion varmego. La 23an de julio venis la plej varmega tago kaj en jenaj urboj la temperaturo superis 40 gradojn:

Kumagaja en la gubernio Saitama: 41,4 gradoj

Oome en la gubernio Tokio: 40,8 gradoj


Taĵimi en la gubernio Gifu: 40,7 gradoj


Koofu en la gubernio Jamanaŝi: 40,3 gradoj

Pro la varmego multaj homoj malsaniĝis. Antaŭ la 24a de julio, pli ol 20000 homoj enhospitaliĝis kaj el tiuj 93 homoj mortis. Laŭ la prognozo tiu varmo daŭros ĝis la komenca semajno de aŭgusto.

En mia hejmo mi neniam uzis klimatizilojn pro elektro-ŝparado, sed en tiu ĉi somero mi unuan fojon uzis ilin kun elektra ventumilo, ĉar mi sentas danĝeron sen ili. En mia ĉambro nun estas 28 gradojn varme, sed en aliaj ĉambroj sen klimatizilo estas ĉirkaŭ 35 gradojn varme.

Tokiaj Olimpikoj en 2020 okazos ĝuste post du jaroj. Certe dum tiu periodo estos varmege. Pro tio maratono okazos je la 7a horo matene






**Probableco de tertremoj**

kaj paŝkonkurso je la 6a horo, kaj oni planas etendi branĉojn de avenuaj arboj por fari ombron por la kurantoj kaj pasantoj, sed ĉu tio sufiĉe efikos? Certe aperos multaj malsanuloj ne nur inter la spektantoj, sed ankaŭ inter la sportistoj.

## Antaŭvidata granda tertremo

"La registara komitato pri tertremoj" publikigis "Mapon pri prognozo de tertremoj" la 26an de junio. Laŭ la komitato, altiĝis probableco de tertremoj kun tremforto de pli ol 6 gradoj en la venontaj 30 jaroj. Ĉirkaŭ la urbo Ĉiba probableco estas 85%, ĉirkaŭ la urbo Mito, 85%, kaj ĉirkaŭ la urbo Jokohamo, 82%. Tamen, strange, tiu de Tokio estas 48% pro tio, ke la urba oficejo hazarde staras sur forta teraso. Se okazos tiu granda tertremo ene de du jaroj, temos ne nur pri Olimpikoj, sed ankaŭ pri pereo de Japanio, ĉar Tokio estos grandskale detruita.

## Morala pereo

Laste mi skribos pri morala pereo de la japanoj. En la ĵus finiĝinta parlamenta sesio la gvidantaj partioj leĝigis la enkondukon de kazinoj en Japanion. La ĉefministro Abe insistis, ke kazinoj fariĝos grava motoro por ekonomia progreso de Japanio.

En Japanio jam ekzistas jenaj vetludoj: ĉevalkonkurso, biciklo-konkurso, boatkonkurso kaj paĉinko [= japana vetludo funkcianta per speciala vetludaŭtomato (ndlr)]. Tiuj vetludoj estas permesataj pretekste, ke la profito eniru en la registaran kason por bonfarto de la popolanoj, sed la nove enkondukotaj kazinoj estos administrataj de privataj kompanioj (certe usonaj) kaj granda parto el la profito iros en iliajn poŝojn. Certe plejparto de la ludontoj estos japanoj. Do japanoj viktimiĝos por usona ekonomia progreso. Certe Abe promesis la leĝigon de kazinoj al Trump kiel lia lojala hundo, subaĉetite de tiuj kazino-kompanioj.

La plej grava problemo pri kazinoj estos multiĝo de vetdependeculoj. Laŭ iu esploro, japanoj plej multe suferas pro vetdependeco en la mondo pro populariĝo de paĉinko:

Japanio: 3,6 % (2017) (4,572 milionoj da homoj)
Nederlando: 1,9 % (2006)
Francio: 1,2 % (2011)
Svisio: 1,1 % (2008)
Kanado: 0,9 % (2005)
Italio: 0,4 % (2004)
Germanio: 0,2 % (2009)

Jam estas granda problemo pri tiuj paĉinko-dependeculoj, sed nun enkondukiĝos tute nova, tre danĝera kazino, en kiu homoj unumomente perdos kvantegon da mono. Homoj, kiuj ne povas labori bone aŭ estas senlaboraj, ne havas hobiojn, ne havas amikojn..., povas facile fariĝi vetdependeculoj, kaj ili prunteprenas kaj ŝtelas monon. Sekve okazas disiĝo de la familio, bankrotiĝo, kaj tiaj homoj troviĝas ĉie en la sufoka japana socio. De korea amiko mi aŭdis, ke en urbo en Koreio, kie estas kazino, foje oni vidas homon sinpendumantan sur la strato kaj la urbo mem malprogresis pro multiĝo de krimoj. La tipa ekzemplo en Japanio estas s-ro Ikaŭa,



prezidanto de granda paperkompanio, kiu perdis 10 miliardojn da enoj (100 milionojn da eŭroj) en Las Vegas en Usono. La leĝigo de kazinoj subfosos la socian bazon kaj putrigos la socion.

70% de la popolanoj kontraŭas la leĝigon, sed Abe tute ne aŭskultis la voĉojn. Nun ne nur pro la kataklismoj, sed ankaŭ pro kazinoj kaj la mensoga ĉefministro Abe, Japanio estas pereanta morale.

HORI Jasuo
*La 24an de julio 2018*



**Paĉinko-salono**

# Libereco por Shen Meng Yu

## Faktoj



De la mezo de majo 2018, laboristoj en la fabriko por veldado-iloj JiaShi (Jasic Technology) intencis organizi laboristan sindikaton por plibonigi siajn laborkondiĉojn. La fabriko situas en la laborist-batalema urbo Shenzheng, najbara urbo de Honkongo, suda Ĉinio.

La laborkondiĉoj de la laboristoj ege malpliboniĝis. Salajroj, sociala asekuro kaj helpo al loĝado estas tranĉitaj. Normoj de laboroj (produktiveco) estas ŝanĝitaj sen akordigo. Laboristoj diras ke la firmao traktas ilin “kiel sklavojn”.

En Popola Respubliko Ĉinio oni rajtas havi sindikatan aktivadon nur ene de la Oficiala Sindikato.

De la mezo de julio la kompanio JiaShi reagas per maldungo kaj perforto kontraŭ aktivuloj. Ankaŭ la polico subpremas la laboristojn perforte kaj areste. Post la okazigo de luktoj kaj subpremoj, en la 27-a de julio la polico arestis 29 laboristojn kaj studentojn kaj kruele traktis ilin en la policejo. En la 29-a de julio studentoj tra Ĉinio, ekz. de la Pekina Universitato, la Ĉina Popola Universitato kaj la Nanjing-Universitato lanĉis alvokon kontraŭ la subpremo. Pro tio la movado disvastiĝas.



Shen Meng Yu montras dokumenton

Unu el la gvidantoj de la batalo, Shen Meng Yu, elektis vojon kiel laboristo post la magistriĝo en la Zhongshan-Universitato. Nokte al la 11-a de aŭgusto, neidentigitaj viroj forkondukis ŝin. Ŝi malaperis. Oni pensas ke ŝi estas en la stato de deviga malapero.

Tiu laborista movado ne estas izolita, sed rilatas al multaj strikoj kaj laboristaj agadoj kiuj okazis ekde la jaro 2000 kaj pli ofte ekde 2015 ĝis nun. Oni povas mencii, ekzemple, la strikojn en Honda en 2010. Ĉio ĉi rilatas al la mizeraj laborkondiĉoj de la laborista klaso en Ĉinio, kiuj antaŭ nelonge malpliboniĝis pro la agado de la registaro.

## Danĝeroj kaj perspektivoj

Tiaj movadoj estas foje subtenataj de enlandaj maŭistaj organizaĵoj. Tiu ĉi estas la nura opozicio tolerata de la ĉina registaro. Tiu opozicio trovas eĥon ene de parto de la popolo pro nostalgio de la ŝtateca ekonomio kaj pro iliaj egalemaj proklamoj.

Sed maŭismo estas ja mistifiko de la marksismo, kiu, ekde 1920 pravigas ĉiajn kunlaboradojn kun la nacia burĝaro en la nomo de la demokrataj revolucioj kaj la kontraŭ-koloniista lukto, kaj aganta tutmonde kontraŭ la proleta revolucio. Ni memoru ke Maŭ foje kunlaboris kun la burĝara kaj naciista Kuomintang kontraŭ la ĉina proletaro. Maŭ, - post la alproprigo de la potenco, pro la falo de la burĝa ŝtato samtempe kun la retreto de la japanaj okupaciaj fortoj – organizis burokratan kaj polican ŝtaton kiu estis simila al tiu de Stalino en Rusio, kie, malgraŭ tio ke la burĝaro estis sen-propriĝita kaj la ekonomio estis planita, la proletaro ne havis la potencon kaj nur malmultajn rajtojn.

La ĉina burokrataro estis fakte dum la jardekoj en la tranĉeo de la rusa burokrataro kaj la internacia burĝaro, kaj pravigis multajn decidojn kontraŭ la proletaro sub la flago de “marksismo-leninismo” kaj per la “penso de Maŭ Zedong”: la subpremadon de la germanaj laboristoj dum 1953; de la hungaraj laboristoj dum 1956; la direktivon al PKI por kapitulaci al la indonezia burĝaro en 1965; la viziton de Nixon dum la egaj bombardoj de Vjetnamio, Laoso, Kamboĝo dum 1972, ktp.

Ankoraŭ pli: la terura diktaturo kiu estis konstruita sub la maŭisma ideologio, decidis en 1992 la reeniron de Ĉinio al la internacia kapitalista ekonomio, tenanta la ĉinan proletaron sen ia libereco de organizo, esprimo, kolektiĝo, ktp., por sin defendi de la ekspluatado. La maŭismo estas, do, unu el la plej gravaj kaŭzoj de la nuna situacio en Ĉinio.

Eblas, ke la "maŭistaj" organizaĵoj intencos regi tiun komenciĝantan laboristan movadon, por gajni politikajn poziciojn, kiuj estis perditaj kontraŭ la PCĈ-frakcio kiu nun regas la aktualan ĉinan registaron aŭ por gvidi ĝin kaj montri la utilon de tiuj organizaĵoj kiel ia "reformista" partio. Sed ankaŭ alia danĝero povas minaci tiun movadon. Povas okazi ke oni proponos kunlaboreman sindikatismon simile al tiu de Usono, Eŭropa Unio aŭ Japanio.

Do, oni bezonas perspektivojn klasajn, politikajn kaj revoluciemajn por eviti tiajn danĝerojn.



**Grupo de laboristaj subtenantoj de Jasik en apartamento de Huizhou, Shenzhen, la 23-an de aŭgusto 2018. La sekvan tagon la polico perforte eniris tiun lokalon kiam ene estis proksimume 50 homoj.**

## Alvoko

Ni tute subtenas la agadon de la ĉinaj laboristoj kaj kuraĝigas ilin por sin organizi sendepende de la ŝtato kaj la mastraro, sindefendi de la polico kaj la armeo, senproprigi la kapitalon kaj konstitui potencon: laborista kaj kamparana registaro per Laboristaj Konsilioj.

Ni alvokas ĉiujn laboristajn organizaĵojn de ĉiuj landoj al materia kaj efektiva solidareco kun la lukto de la ĉina laborista klaso por iliaj laboristaj, sociaj kaj politikaj depostuloj fronte al la ŝtato kaj la mastraro.

**Libereco por Shen Meng Yu kaj la aliaj arestitaj laboristoj!**


**Antaŭen kun la ĉina laborista movado!**

*Internaciema Kolektivista Cirklo*

Fonto:
http://www.revolucionpermanente.com/esperanto/2018/09/15/libereco-por-shen-meng-yu/

TURKIO

# Liberigi la enkarcerigitajn laboristojn de la konstru-sektoro – Garantii la sekurecon en la laboro ĉe la flughaveno de Istanbulo




Ĉirkaŭ 30 000 laboristoj sur la konstruejo de la nova Granda Flughaveno de Istanbulo suferas pri memevidenta manko de sekuraj kaj sanitaraj aranĝoj en la laboro. Iliaj labortempoj estas ekscesaj kaj iliaj salajroj prokrastitaj. Almenaŭ 37 laboristoj mortis kaj multaj aliaj estis vunditaj dum la lastaj kvar jaroj. Por protesti kontraŭ la morto de laboristoj, kaj la maldecaj laborkondiĉoj, la laboristoj ekstrikis la 14-an kaj 16-an de septembro. La milita polico uzadis ekscesan forton kontraŭ ili kaj ĉirkaŭ 600 laboristoj estis perforte arestitaj. 35 laboristoj, inter kiuj Ozgur Karabulut, prezidanto de DİSK/Dev Yapı-İş (progresisma sindikato de la laboristoj en konstru-sektoro), kaj gvidantoj de la sindikato İnsaat-Is estis enkarcerigitaj. Aliparte, centoj da personoj estis maldungitaj.

Fonto:
https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3902

# Ekologia konstruado en Afriko

Ĝenerale Esperanto rilatas en la homaj mensoj al turismo, internacia amikeco, kaj tiel plu. Tamen, ĝi estas ankaŭ ligita al civitanaj partoprenoj, sociaj luktoj, ene de politikaj partioj, de plej diversaj asocioj, foje NRO-j (Ne-Registaraj Organizoj).

Sed, ĉu multaj esperantistoj zorgas pri teknikaj fakoj? Esperanto disvolviĝis en pluraj direktoj, kaj ĝia ĉeesto en sciencoj estas rimarkinda. Male, ĝiaj aperoj kaj aplikaĵoj en fakaj medioj estas tro maloftaj.

En la fako "konstruado" ekzistas malbone konata asocio, kun la bombasta nomiĝo TAKE: Tutmonda (!) Asocio de Konstruistaj Esperantistoj. Ĝi aperigas de 2005 jaran kajeron, kie eblas legi pri arkitekturo, konstruaj teknikoj, aŭ pri jam realigitaj konstruaĵoj. Malgraŭ nesufiĉo da kunlaborantoj, ĝi klopodas respeguli ne nur eŭropajn aferojn.

En 2017, okaze de la Internacia Kongreso de Fervojistoj, ĝi eldonis specialan numeron pri tuneloj kaj stacidomoj kun artikoloj venintaj de Eŭropo sed ankaŭ de Japanio kaj Ĉilio. Ĉi-jare (2018) ĝi ebligas malkovri la tradician konstruadon en Afriko "La Nubia Volbo" [1].




**Informi la loĝantaron**

Kiam kamparanoj deziras kovri sian domon, ili disponas pri plej internacia rimedo: ondumita lado. Tiu ŝtala materialo prezentas gravajn mal-avantaĝojn: ĝi kostas multe (ĉar ĝi devenas de fora regiono aŭ lando); ĝi ne ŝirmas kontraŭ bruo kaj, precipe, ne kontraŭ varmego. Imagu vivi en okcidenta Afriko kiam la temperaturo altas pli ol 45°!

De kelkaj jaroj, la asocio *La voute nubienne* [2] klopodas konatigi malnovan tradician konstru-metodon per brikoj. La avantaĝoj estas multaj: la kruda materialo troviĝas surloke: argilo por muldi brikojn, suno por sekigi ilin. Tial la materialoj ne kostas multe. La konstruado havigas labor-postenojn kaj ebligas al multaj junuloj eklerni profesion. En tiuj regionoj de



**Muldado de brikoj, sekigotaj per suno**



**Masonistoj muntas brikojn sen cintro**



Kontroli la volbo-formon



Lernejo en Senegalio

landoj kiel Malio, Burkino, Ganao, Kameruno la temperaturoj estas ofte altegaj kaj tiaj domoj bone ŝirmas kontraŭ varmego.

Plie, ĝia konstruado ne produktas rubaĵojn kaj konsumas malmulte da ligno – resurso malofta kaj kostega. Fine, krom la avantaĝoj koncerne ekonomion, socialajn aspektojn kaj klimaton, ĝia disvolviĝo estas la decida ago de la loĝantaroj mem kaj, pro la respegulo de malnova konstrua tradicio, ĝi prezentas ankaŭ kulturan intereson.

La plej okulfrapa rezulto estas muntado de brikoj laŭ oblikvaj vicoj sen uzo de cintro (de kofro). Nur ĉe starigo de fenestro, pordo aŭ alia aperturo uzeblas ligno. Por kontroli la regulan formon de la volbo, la laboristoj streĉas kablon ĉe la centro kaj uzas ĝin por ŝovi kabletojn kiel cirkelojn! Elturniĝemo, senso pri praktika rezulto...

Resume, per agado sur tiu konstrua kampo estas traktataj multaj temoj: aliro al loĝejo, kreo de dungoj per daŭrebla ekonomio, adaptiĝo al la klimataj kondiĉoj, valorigado de malnova kulturo. Kiel esperantistoj atentemaj al niaj fratoj ĉiu-kontinentaj, ni povas nur aprobi!

La tutan revuon *Konstruado 2018* (60 paĝoj, prezo 8 €, inkluzivanta sendokostojn) oni povas mendi ĉe Pierre Grollemund per mesaĝo al la ret-kesto: verdapigo@yahoo.fr

PIERRE GROLLEMUND

**Notoj:**
[1] http://lavoutenubienne.org/
[2] La nubia volbo.




Ĉe arkaĵo duoncirkla necesas ligna cintro



Klare videblas la kliniĝo de la briko-vicoj

# Danĝerego de la nuklea centralo Tomari



Terfaloj okazis en multaj lokoj.



La nuklea centralo Tomari

## Granda tertremo okazis

Je la 3a kaj 8 minutoj la 9an de septembro okazis granda tertremo en la suda parto de Hokajdo.

En Japanio ofte okazas tertremoj. La registaro kaj sismologoj esploras, kie estas aktivaj faŭltoj, kaj faras mapon pri tiuj, sed tiu ĉi tertremo okazis, ne laŭ tiuj konataj faŭltoj, sed laŭ nekonata faŭlto. Tio signifas, ke estas multegaj nekonataj faŭltoj en la japana insularo, sekve ĉie povos okazi grandaj tertremoj.

Mi vidis en televido la damaĝojn, kaj mi tre surpriziĝis pro la nekredebla nombro da terfaloj kaŭzitaj de la tertremo. Ĉiuj montoj estis kvazaŭ skrapitaj per grandegaj ungoj (vidu foton). Vulkana cindro, kiu kovris la montojn, subenglitis pro la tremegoj kaj mortigis ĉirkaŭ 40 homojn, detruante iliajn domojn. Tio ne estas nur la problemo de Hokajdo, ĉar Japanio estas vulkana insularo kaj ĉie estas similaj terenaj formoj.



Alia surprizo estis, ke okazis terlikviĝoj en la ĉefurbo Sapporo 50 kilometrojn for de la epicentro. Tie, pro la aktiviĝinta subtera akvo vojo sinkis kaj domoj kliniĝis.

La tertremo kaŭzis alian grandan problemon. Tio estas paneo de tri termoelektraj generatoroj de la elektra kompanio Hokajdo (mallongigita nomo, Hokuden) en la urbo Acuma, sub kiu okazis la tertremo. Tiu centralo liveris duonon de la bezonata elektro en Hokajdo. La paneo influis aliajn malgrandajn generatorojn, kaj sekve ĉiuj generatoroj de Hokuden haltis. En la moderna vivo homoj ne povas vivi sen elektro. Fabrikoj ne povis funkcii, bovistoj ne povis melki, sekve bovinoj mortis pro mam-malsano, hospitaloj ne povis kuraci malsanulojn, resume: ĉiuj funkcioj haltis kaj la ekonomio suferas multe. Eĉ nun elektra liverado ne estas sufiĉa kaj ne estas stabila, do la loĝantoj vivas en maltrankvilo.

Ankaŭ la nuklea centralo Tomari, kiun Hokuden posedas, suferis perdinte la tutan elektran fonton el ekstere kaj, dume, ĝi devis dependi de memproduktita elektro. Feliĉe, tiam ĉiuj reaktoroj ne funkciis pro ekzamenado. Se ili funkciintus, tio kaŭzintus denove grandan nuklean katastrofon. En la nuklea centralo Tomari estas tri nukleaj reaktoroj.



Fendo sur rizkampo kaŭzita de la tertremo en Kumamoto en 2016.



Detruita tereno en la nuklea centralo Kaŝiŭazaki-Kariŭa en Niigata kaŭzita de la tertremo en 2007. TEPCO riparas ĝin kaj provas refunkciigi tiun difektitan centralon.

# Mia amikino pledos en la tribunalo

Kontraŭ ĉiuj nukleaj centraloj en Japanio estas protestaj agadoj. Ankaŭ en Hokajdo estas movado kontraŭ la nuklea centralo Tomari kaj oni akuzas Hokuden-on, postulante forĵeton de tiu centralo. Mia konato, s-ino Higuĉi Minako, kiu agadas dekomence kontraŭ tiu centralo, pledos en la tribunalo Hokajdo la 9an de oktobro. Ŝi sendis al mi informon pri tio kaj ankaŭ la tekston por sia pledado. Ŝi prezentas sin jene:

*Mia nomo estas Higuĉi Minako. Mi respondecis pri la informilo de "Societo agadanta por forĵeti la nuklean centralon Tomari" ekde junio 2011 ĝis junio tiun ĉi jaron.*

*Kiam ni decidis meti la kazon en la tribunalon, ne estis sufiĉe da kunlaborantoj, do mi kaj aliaj du laboris per telefono kaj retmesaĝoj por tiu laboro. Kiam ni sukcesis kolekti 612 homojn kiel akuzantojn, mi iĝis tre ĝoja. Nun ni havas 1233 akuzantojn.*

*Mi neniam forgesas la akcidenton en Ĉernobil en 1986. Eĉ en la fora Hokajdo falis nukleaĵoj. Kelkajn tagojn post la akcidento mi naskis la unuan bebon. Por protekti ĝin kaj nin, kiel zorge mi elektis manĝaĵojn! Por disvastigi informon pri la danĝero de la nuklea akcidento, mi komencis eldoni etan informilon "Ginga Cuuŝin" (Informilo Galaksio), kaj tiu ĉi jaro estas la 30-jariĝo de la informilo.*

*Mi ne estas sperta en publika parolado, sed kiel unu el tiuj, kiuj spertis la ĉi-fojan senelektran, tute malluman vivon, mi parolos pri la temo "La ĉi-foja tertremo en Hokajdo igis pli klara la danĝeron de la nuklea centralo Tomari". Ĉiuj povos ĉeesti ĉe la juĝado. Mi atendas vian ĉeeston.*

# La ĉi-foja tertremo en Hokajdo igis pli klara la danĝeron de la nuklea centralo Tomari

Teksto de la parolado de la akuzanto Higuĉi Minako en la tribunalo.

*Frumatene la 6an de septembro okazis tertremo kun sisma intenso 7 (magnitudo 6,7) en la orienta distrikto de Iburi, kaj la elektra kompanio Hokajdo (Hokuden) perdis la funkcion liveri elektron en la tuta Hokajdo. Mi loĝas en la urbo Ebecu, 60 kilometrojn for de la epicentro Acuma, sed al mia domo ne venis elektro dum du tagoj. Trafiko ne funkciis. Vendejoj estis fermitaj. Ni ne povis aĉeti manĝaĵojn. Informoj venis nur per radioaparato, kiu apenaŭ funkciis per baterio. Mi unuan fojon spertis teruron de tute mallumaj stratoj sen trafikaj signaloj. Ĉi-foje mi parolos nur pri tio, kion mi rimarkis en tiuj mallumaj noktoj.*

*Pro la tertremo termoelektraj generatoroj n-ro 2 (600 mil kW) kaj n-ro 4 (700 mil kW) de Hokuden ĉesis funkcii pro damaĝoj al tuboj, kiuj transportas varmegan vaporon. Kaj post 17 minutoj la generatoro n-ro 1 (350 mil kW) ĉesis funkcii. Pro tio perdiĝis duono de la bezonata elektro en Hokajdo, kaj perdiĝis ankaŭ ekvilibro inter la aliaj generatoroj, sekve okazis tuta senlumiĝo en la tuta insulo Hokajdo. La generatoro n-ro 3 jam antaŭe estis forĵetita.*

*Nukleaj reaktoroj, tiutempe ne funkciantaj, en la nuklea centralo Tomari, perdis elektron venantan el ekstere dum 19 horoj kaj duono. Dume urĝokazaj generatoroj funkciis kaj malvarmigis nukleajn brulaĵojn en la akvujoj. Se tiuj generatoroj paneintus, tiuj brulaĵoj povintus fariĝi kritaj.*

*En tiu tertremo, sisma intenso en Tomari estis nur 2. Eble Hokuden antaŭvidis eventualan grandan tertremon, kiu povus perdiĝi eleksteran elektron, sed ĝi tute ne antaŭvidis, ke tertremo fore okazonta kaŭzos senelektriĝon en la tuta Hokajdo, nek ke la nuklea centralo perdos eleksteran elektron dum multaj horoj. Hokuden pledadis en tiu tribunalo, ke ĝi prenas/is ĉiajn rimedojn kontraŭ ĉiaj danĝeroj por gardi la reaktorojn, sed ĝi tute ne antaŭvidis, ke la eleksterа elektro tiel facile perdiĝos.*

*Se la nukleaj reaktoroj funkciintus tiun tempon, kio okazintus? Malvarmigi uzitajn brulaĵojn en akvujoj kaj malvarmigi funkciantajn reaktorojn estas tute malsame. Antaŭ sep jaroj, pro la granda cunamo en Fukuŝima*

*kvar reaktoroj sinsekve perdis elektran fonton kaj detruiĝis, disĵetante nukleaĵojn en la orienta Japanio. Fukuŝima-anoj perdis sian trankvilan vivon. Ĉu ili reakiris la trankvilan vivon? Ankoraŭ la akcidento ne finiĝis. Spertinte senelektran vivon, mi forte konstatis, ke ni ne povas vivi sekure kaj trankvile kun nukleaj centraloj.*

*La dua grava afero dum tiu ĉi tertrema katastrofo estas, ke oni havis 17 minutojn inter la paneoj de la dua kaj la kvara generatoroj kaj tiu de la unua generatoro. Multaj esploristoj menciis, ke Hokuden povus eviti tutan senelektriĝon, se ĝi ekvilibrigus ofertadon kaj mendadon de elektro, malfunkciigante generatorojn en aliaj lokoj. La kompanio tute ne estis preta por krizaj okazoj. Ĝi ne havas kapablon teni la nukleajn centralojn sekuraj. Tio fariĝis tute klara al ĉiuj, okaze de la ĉi-foja tertremo.*

*La tria grava afero estas, ke la ĉi-foja tertremo okazis en ne antaŭvidata loko. Ĝi okazis 37 kilometrojn profunde kaj kaŭzis grandegajn terfalojn. En la maro apud la nuklea centralo Tomari troviĝas simila faŭlto kiel tiu en la urbo Acuma. Se okazos tertremo apud Tomari, ĝi trafos la nuklean centralon, kaj donos grandan damaĝon al ĝi, rompante tubojn per vertikalaj tremetoj.*

*Fine, mi legos parton de mia eseo, kiu aperis en la libro* Leteroj al Hokuden *antaŭ 29 jaroj:*

*"Se okazos nuklea akcidento en Tomari, la unuaj viktimoj estos infanoj. Tia akcidento malpuriĝos la maron, la aeron kaj la teron, kaj tra poluitaj manĝaĵoj radioaktiveco akumuliĝos en ilia korpo.*

*Mi iam vizitis la vilaĝon Tomari. Tie estis tre bela marbordo. Kial oni tie konstruis la nuklean centralon? Mi rememoris la golfon Ŝiranui en la gubernio Kumamoto. Tie estis bela kaj fekunda maro. En tiun maron la nitrogena fabriko forĵetis venenan hidrargon. Tiu ne estas videbla, nek flarebla, same kiel radioaktivaĵo, tial la loĝantoj, tute ne rimarkante la danĝeron, manĝadis poluitajn fiŝojn, kaj suferis pro malsano nomata "Minamata malsano". Eĉ beboj naskiĝis malsanaj. ... Vi forĵetu la nuklean centralon Tomari, se vi amas vian familion."*

*Se la nuklea centralo funkciintus, kiam okazis la tertremo, povintus okazi granda akcidento. Mi postulas, ke la danĝera nuklea centralo Tomari estu tuj forĵetita. Mi esperas, ke la juĝistaro verku ĝustan verdikton.*

Kiam mi aŭdis, ke la ekstera elektro perdiĝis, mi tre timis. Certe la nuklea centralo havas sian propran generatoron por produkti elektron, sed por tio oni bezonas benzinon aŭ pezan oleon. Ĉu Hokuden havas suficê da rezervo? Kiom da tagoj ĝi povos produktadi elektron?

Kaj alia timo estas, ke tertremoj povas rompi tubojn en la centralo. Nukleaj reaktoroj estas ligitaj per multege da grandaj kaj malgrandaj tuboj. Se tiuj estos rompitaj, okazos katastrofo. Post grandaj tertremoj oni ofte trovas grandajn fendojn sur la tero. Se tia fendo okazos sub la nuklea centralo, nukleaj reaktoroj ne povos rezisti. Kaj tian akcidenton ni jam spertis en la nuklea centralo Kaŝiŭazaki-Kariŭa en la gubernio Niigata en julio 2007.

Ĉiuj timas eventualan nuklean akcidenton, sed la registaro kaj la industria mondo persiste provas funkciigi ĉiujn nukleajn reaktorojn. Kiam okazas grandaj tertremoj, la unua demando aperanta en la kapo de multaj homoj estas "Ĉu la nuklea centralo ne estis difektita?" Ni ne plu volas vivi kun tiu timo.

HORI Jasuo

# Kio okazas al nukleaj centraloj en Japanio?

**Jam sep jaroj pasis post kiam kvar nukleaj reaktoroj en Fukuŝima serioze difektiĝis. Nun, kio okazas al japanaj nukleaj centraloj?**

## TEPCO decidis forĵeti ĉiujn 10 nukleajn reaktorojn en Fukuŝima

Antaŭ la akcidento en 2011, estis 10 reaktoroj en Fukuŝima, nome ses en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima kaj kvar en la nuklea centralo n-ro 2 de Fukuŝima. El tiuj, kvar en la centralo n-ro 1 estis difektitaj kaj nun estas forĵetataj. La aliajn du en la centralo n-ro 1 TEPCO jam decidis forĵeti, sed pri la kvar reaktoroj en



**La nuklea centralo n-ro 2 de Fukuŝima**



La nuklea centralo n-ro 2 de Tookai




Laboristoj en nuklea centralo

la centralo n-ro 2, TEPCO kaŝadis sian intencon, dirante, ke la registaro estas respondeca pri tio, sed la 14an de junio ĝi finfine publikigis, ke ĝi forĵetos tiujn kvar. Je la ĝojo de la Fukuŝima-anoj, ĉiuj 10 reaktoroj estos forĵetitaj kaj Fukuŝima fariĝos sennuklea gubernio. Gratulon al ili kaj ni!

Por forĵeti la ses en la centralo n-ro 1 TEPCO bezonos 280 miliardojn da enoj (2 800 000 000 eŭrojn) kaj 30-40 jarojn. Anstataŭe, ĝi intencas refunkciigi sep nukleajn reaktorojn en la nuklea centralo de Kaŝiŭazaki-Kariŭa en la gubernio Niigata, kiuj haltis post la tertremo en Niigata en 2007.

Mia konkludo: Ŝajne TEPCO malvenkis kontraŭ la Fukuŝima-anoj, sed ĝi ne ĉesas intrigi por renversi la situacion en alia gubernio.

## La nuklea centralo n-ro 2 de Tookai

La Nuklea Reguligada Aŭtoritato aprobis, ke la nuklea centralo n-ro 2 de Tookai en la gubernio Ibaraki (unu reaktoro) estas taŭge riparita. Tiu centralo situas en la metropolo, kaj en la radiuso de 30 kilometroj de ĝi loĝas 960 mil homoj. Ne sufiĉas plano por rifuĝado, sed la aŭtoritato estas respondeca ne pri rifuĝado, nur pri ekzameno pri taŭgeco de la reaktoro al la regularo. Tiu ĉi reaktoro ekfunkciis en 1976, do ĝi estas kaduka reaktoro pli ol 40-jara. Laŭ la leĝo oni ne povas uzi reaktoron pli ol 40-jaran, sed la aŭtoritato jam aprobis sep reaktorojn kiel taŭge riparitajn por funkciado, kaj la elektraj kompanioj ĝoje preparas ilian refunkciigon.

Mia konkludo: Fortuloj ĉiam provas trovi kaŝitan vojon.

## TEPCO rifuzis kompromison kun loĝantoj de Namie

15 000 loĝantoj en la urbo Namie en Fukuŝima, kiuj devis rifuĝi pro la nuklea akcidento, postulis pli da kompensa mono de TEPCO en la Centro por solvi konfliktojn pro la nuklea akcidento, sed tiu ĉi rifuzis la postulon. Dum tiuj 5 jaroj 846 homoj el ili mortis. La urbestro s-ro Baba Tamocu kolere diris, ke TEPCO tute ne havas peksenton pro la akcidento.

Mia konkludo: TEPCO ŝajne pardonpetas, sed en efektiveco ĝia sola celo estas pluvivi, eĉ piedpremante la suferantojn.

## Eksterlandaj laboristoj en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima

En la nuklea centralo n-ro 1, ĉiun tagon 10 000 homoj laboras. Do en unu jaro TEPCO bezonas 3 650 000. Ĝi bezonos 40 jarojn por fini la forĵetadon de tiuj reaktoroj, do en tiuj 40 jaroj ĝi bezonos 146 000 000 homojn (146 milionojn). Ĉu ĝi povos dungadi tiom da homoj? Ĉu ĝi havos sufiĉe da mono por tio? Mi ĉiam timas tion, sed TEPCO estas tre optimisma.

Nun la japana ekonomio prosperas, sed la problemo estas manko de laborforto. Japanio ŝrumpas kun multege da maljunuloj kaj malmulte da junuloj kaj infanoj. Pro tio, la registaro invitas eksterlandajn gejunulojn el Azio kiel "trejnatojn". Ili laboras en japanaj kompanioj kaj trejnas sin por ke, revenante al sia hejmlando, ili utiligu akiritajn arton kaj kapablon. Tamen, en efektiveco multaj kompanioj uzas ilin kiel malmultekostajn laboristojn.

Estis malkaŝite en majo, ke ses vjetnamaj "trejnatoj" laboras en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima. TEPCO decidis ne dungi eksterlandanojn en la centraloj. Tiuj ses vjetnamoj ne estis dungitaj rekte de TEPCO, sed de suba kompanio. La prezidanto de tiu kompanio diris: "Mi sciis tiun decidon de TEPCO, sed konstruadkompanioj ne ekzistus sen eksterlandaj laboristoj". En Vjetnamio ne ekzistas nuklea reaktoro, do eĉ se tiuj ses havis laborsperton en Fukuŝima, en sia lando ili nenie povos utiligi sian sperton. Laboro en la nukleaj centraloj estas danĝera, tial malpli kaj malpli da japanoj volos labori tie. Mi supozas, ke, kaŝite, multaj eksterlandanoj laboras en nukleaj centraloj en la tuta Japanio. Mi timas, ke iam, post ne longe, TEPCO forĵetos sian respondecon pri forĵeto de tiuj reaktoroj pro manko de laboristoj kaj mono.

Mia konkludo 1: Ĉiam malriĉaj homoj fariĝas viktimoj por riĉuloj kaj fortuloj.

Mia konkludo 2: La registaro kaj grandaj kompanioj kiel TEPCO ne havas perspektivon de japana estonteco.

HORI Jasuo
*La 26an de julio 2018*

# En 1833, romano kiu estas historia atestaĵo

Inter la malplej konataj romanoj de la franca verkisto Honoré de Balzac estas tiu titolita *La kamparlanda kuracisto* [1].

Tiu stranga romano, kiu entenas preskaŭ neniun intrigon, kaj estas esence monologo de tiu kuracisto, kiu fine de la romano konvinkas alian rolulon iĝi kiel li mem, estas fakte, mi opinias, historie grava atestaĵo, ĉar en ĝi oni trovas la plej netan bildon de la klasmoralo de la burĝaro en la deknaŭa jarcento [2].

La plej rimarkinda parto, komprenseble, estas kiam li parolas pri sia likvido (pri kiu li sin fierigas, kaj sin gratulas) de la "alpaj kretenoj" (temas pri denaskaj menskripluloj specifaj en pasintaj jarcentoj je la alpaj regionoj), kiuj loĝis en la vilaĝo, kies urbestro li estis iĝinta. Tie, same kiel en la "nepreteratentebla" libro de la svedo Sven Lindqvist *Ekstermu ĉiujn ĉi brutojn*, montriĝas al la leganto, ke la naziaj teruraĵoj ne falis senkompreneble de alia planedo! Ili estas la frukto kaj la logika sekvo de la tuta praktiko kaj teorioj de la ilin antaŭanta, koloniisma, kaj socidarvinisma jarcento. Se oni konsideras la unuan el la genocidoj de Hitlero, tio estas tiu nomita "Aktion T4", la "eŭtanazio" de la frenezuloj kaj denaskaj kripluloj, homoj, kiuj laŭ la nazia propagando kostadis tiom da milionoj da markoj al la brava sana germana laboristo, kaj en la nuna epoko la porulojn de la fina solvo de la trisomiuloj 21, kiu disvolviĝas ante, sub niaj okuloj, sen ke iu ajn emociiĝus, krom Jean-Marie Le Mené.

Temas pri la sama klaslogiko, kaj same frukto de la sciencisma kaj ekonomikisma raciismo de la tiama epoko (kaj ankaŭ de la nia), kiu kaŭzis, ke en la burĝa 19a jarcento tiom da aŭtoroj diradis, ke oni devas ne helpi al la mizeruloj nek gastigi la vagulojn, ktp, sed male lasi fariĝi nature la "darvina selektado" kontraŭ la plej malfortaj, do la malpli indaj vivi. Konsiderinte, ke la divido inter riĉuloj kaj malriĉuloj estas la logika konsekvenco de la meritoj de ĉiu, normalas, ke la malriĉuloj, la vaguloj kaj la frenezuloj mortu, ĉar ili estas formoj malsuperaj de la specio, endas ilin ne malhelpi morti, pro malracia karitato! Fakte la motivo – malantaŭ tiuj filozofiaj teorioj – la plej peza, estas, ke ĉio ĉi kostas monon! [3]

En la libro de Balzac la kuracisto-vilaĝestro diras:

"Mi havis por apogi min, kelkajn el miaj dankenduloj, kaj la anojn de la komunuma konsilantaro, al kiuj mi interesigis la avarecon, per pruvo al ili kiom kostis la prizorgo de tiuj kompatinduloj, kaj kiom estus profitdona por la urbeto transigi la terenojn senakte posedatajn de ili, al komunumaj terenoj."

Ja! Ĉio jenas! (Kaj ankaŭ la kialoj de la koloniismo). Ĉio diritas en tiu senartifikula deklaro!

Mallonge dirite, tio kio estas la plej ŝoka en tiu romano (kaj samtempe plej interesa! Ĝi konstistigas ja dokumenton historian, ideologian, moralan!) estas la klasideologio, kiu plenigas ĝin, la nekredebla cinikismo, sub ŝmiraĵoj da hipokrito kaj farizeismo, la maniero kiel Benassis, la heroo de la romano, fanfaronas pri esti efektiviginta la "finan solvon" (ĉar lia translokiĝo, dumnokta, al alia vilaĝo, Aiguebelle, kie "ili estos bone traktataj" – ĉu senpage??? ... – similas ja tro al la fama "translokigo al oriento" de la judoj, kio estis la oficiala decidaĵo en la konferenco de Wannsee!) de la kretenoj, kies prizorgo kostas tiom da mono, kaj kies neutiligataj terenoj povos esti valorigitaj, dum li kvalifikas la profundegan kaj religian respekton de la kamparanoj por la vivoj de tiuj "senpekuloj" (kiel diras la tradicio) kiel "nekompreneblan superstiĉon". Nekomprenebla! La respekto kontraŭ la "nuda vivulo" (kiel diras Giorgio Agamben), ne profitdona... Tio lasas vomemon antaŭ la moraleco de la sciencismaj burĝoj de la 19a jarcento!

Kaj la maniero kiel li utiligas la religion kiel "potencan levilon" por instrui al la kamparanoj respekti prefere kiel sanktan kaj netuŝeblan, la privatan proprieton [4] bone montras la klasan ideologiecan karakteron de ĉio ĉi. Markso ne jam estis verkinta tiam, sed kiel oni komprenas lin, kiam oni legas tion!

He jes! Alia trajto grava, kiun oni malkovras tie, estas tiu respekto [5], kiun sentas senpense la kamparanoj sorbintaj kristanismon kontraŭ tiaj "nudaj vivoj". Ni legu en la franca Vikipedio en la artikolo "kretenismo": "kreteno estis rigardata kiel senpekulo, feliĉulo", kaj "la menskripluloj estis gastigataj en la monaĥejoj dum la Mezepoko". Same en 1939 nur la katolika eklezio (jes, tiuj nigraj ŝafoj, kiujn oni diras pedofiloj kaj kies oponon al abortigo kaj eŭtanazio hodiaŭa ideologio tiom emas kritikegi kaj kvalifiki kiel "ekstremdekstran ideologion"!) en la persono de la episkopo de Münster provis protesti kontraŭ tiu politiko hitlera.

Roland Platteau

**Notoj:**

[1] Legebla en la origina lingvo per Interreto: https://fr.wikisource.org/wiki/Le_M%C3%A9decin_de_campagne


[2] Ni ĉi-preterdire memorigu unu el la bazaj tezoj de la marksismo: la ideoj kaj beletraj produktaĵoj de la homoj estas determinitaj de la "materiaj produktadorilatoj", de iliaj materiaj klasaj interesoj. Jen ili celas, konscie aŭ senkonscie, pravigi ilin, jen ili respegulas la mondon, viditan tra tiuj ideoj, tiuj zorgoj, la valoroj implicaj en ili.

[3] Ni memoru la reformon de 1834 en Anglio, kiu kondukis al la fifamaj *workhouses*, priskribitaj de Dickens! Relegu viajn historilibrojn.

[4] Vidu la ĉapitron 3: https://fr.wikisource.org/wiki/Le_M%C3%A9decin_de_campagne/3

[5] Balzac, same kiel ĉiuj sciencismaj burĝoj, "liberpensuloj", klerismaj malestimuloj de la popola "malklereco" – en nia epoko oni dirus "popolismo", ankaŭ tiu termino ne estas senkulpa! – komforte sidantaj en sia bonpensanta klasegoismo, kvalifikas ĝin "superstiĉo".

# Septembre, surstrate tra la mondo




***Septembre, surstrate en Tokio.***
***Granda Tertremo en la regiono KANTÔ 1923 – Postsono de Masakro.*** **(Dokumenta libro)**
**Verkinto: KATÔ Naoki**
**Tradukinto: MAMIYA Midori**

Tra la mondo oni ekskludas migrantojn, diskriminacias alinacianojn kaj eĉ masakras aliflankajn popolojn. La celo eldoni ĉi tiun esperantan version de "Septembre, surstrate en Tokio" estas montri al la mondo ke sur la japaninsularo troviĝis kaj daŭre troviĝas aferoj simile en la mondo. Tio signifas ke ankaŭ japana popolo estas respondeculo por konstrui mondskalan justecon kaj batali kontraŭ nacia diskriminacio.

Dum internacia komunikado estas sub maljusta situacio diverssignife, Esperanto estas plej taŭga lingvo esprimi nian ideon. Malgraŭ tio, se la libro estos tradukita al imperiismaj lingvoj, nome la angla, la franca, la rusa ktp, ni ege ĝojos pri tio. Ĉar nun aperas la libro nur en la japana, la korea kaj ĉi tiu en Esperanto.

*Unue trakti sian landon kaj ekskludi migranton* estas reakcio de diversaj socitavoloj, kiu aperis kontraŭ la blovo de tutmondiĝo. Tiu reakcio kaŭzos ekonomian depresion aŭ militon. En la estonteco tutmondiĝo devos enkonduki sistemon de bazeca enspezo, kiel mildigi ekonomian diferencon en ĉefaj landoj. Poste, koncernateco kaj memdecideco de monda popolo kontraŭ monda regado de tutmondiĝo estos grava celo de popolo. Rolo de Esperanto, alternativa internacia lingvo, kiu celas solvi problemon de monda komunikado demokratie, estos ankaŭ tre grava. En la nuna situacio, estos certe ke esperanta versio de "Septembre, surstrate en Tokio" iĝos unu el la trezoroj por la homaro.

Komitato por eldoni esperantan version de "Septembre, surstrate en Tokio"

*Septembre en 2018*
MIYAZAWA NAOTO

# Pri epistemologio

La plejparto el la kritikoj, kiuj nuntempe trafas la redaktejon de *Sennaciulo*, rilatas ne al tio, kio ne estas publikigita (kutima plendo ĝis antaŭ nelonge), sed al tio, kio publikiĝas. Inter kelkaj SAT-membroj estas forta rezisto akcepti la aperigon de artikoloj, kiuj ne apartenas al nia klasika laborist-movada repertuaro (kiu estas komprenata, esence, same kiel antaŭ unu jarcento: strikoj, manifestacioj, sindikatismo, politiko... kaj ne multo pli) aŭ enhavas ideojn, kiuj distanciĝas de kelkaj el tiuj, kiuj tradicie estas komprenataj kiel propraj al nia SAT-medio (sed, ĉi-rilate, ĉiu el ni havas sian apartan kriterion).

Inter la kritikoj, kiuj atingis nin, kelkaj meritas, laŭ mia vidpunkto, apartan pritraktadon pro tio, ke ili ne limiĝas protesti, sed provas detale argumenti siajn starpunktojn. Ĉi-okaze, la fajrero, kiu minacis bruligi la arbaron, estis la publikigo de la teksto de Krob, kiu aperis en *Sennaciulo* 01-02 (2018), kaj, aparte, la bildo, kiu ilustras ĝin (pri kiu nur mi mem respondecas). Mi celas ne nur la analizon de ĉi konkreta okazintaĵo, sed profiti por prikomenti ĝeneralajn aspektojn de nia kutima pens-maniero. Por plej bone sekvi la diskuton, prefere havu ĉe-mane la komentatan artikolon, kiu estis publikigita sur la paĝo 25 de la supre citita numero de *Sennaciulo*. Mi elektis eltiraĵojn el la kritikoj, kaj, tuj poste, prikomentos ilin.

"(...) mi ne ŝatas la tuton ĉar (...) li diras *Mi respondas al homoj, kiuj obeeme informas sin nur helpe de oficialaj komunikiloj*. (...) Li mem poste agnoskas ke li plie fidas en komunikiloj konsiderataj "rasismaj", "ksenofobaj" ĉar ili estas alternativaj!"

La fakto, ĉu ni ŝatas, aŭ ne, la enhavon de artikolo, ne estas, en si mem, argumento por malhelpi ĝian publikigon. Se mi ne akceptus la publikigon de tio, kion mi ne ŝatas, mi jam antaŭ longe estus foririnta el la redaktejo. Sed, laŭ mia vidpunkto, la enesto de malsamaj opinioj buntigas la revuon, kio estas preferinde al unutonaj periodaĵoj. Sed la kritika argumentado, iom misformante la originalajn esprimojn de Krob, aludas la fakton, ke li pli fidas "alternativajn" komunikilojn ol "oficialajn", kio, ĉi-okaze, estas nepardonebla, ĉar temas pri novaĵfontoj taksataj "rasismaj" kaj "ksenofobaj". Sed ĉi tiun taksadon ne faras Krob mem. Tio, kion li diras, estas, ke la "oficialaj" komunikiloj tion asertas por senkreditigi la "alternativajn". Jen kutima maniero por eviti la debaton: la alfrontataj ideoj venas el tendaroj tiel fiaj, ke ili eĉ ne devas esti aŭskultataj. La sekvo estas, ke ni tenas nian trankvilon neĝenata, kaj, dume, la opinioj de la "fiuloj" senbremse cirkulas kaj disvastiĝas. Indas rimarkigi, ke la kritika sinteno baziĝas sur antaŭjuĝoj, ne sur faktoj. Kaj la faktoj, ĉi-okaze, nediskuteble pravigas la asertojn de Krob pri tio, ke la "oficialaj" komunikiloj ne ĝustatempe informis pri eventoj, kiuj estis gravegaj pro iliaj amplekso, kunordigita karaktero kaj perforta sinteno, aparte kontraŭ virinoj, multfoje kaj multloke sekse mistraktataj.

"Mi ne opinias, ke rereago je ĉi tiu lasta opiniesprimo de Krob necesas. Tiu ĉi lasta sinesprimo de li ne plikomprenebligas liajn ideojn, sed nur surtabligas pliajn rakontojn ĉerpitajn el "alternativaj" novaĵfontoj. Refuti ilin postulus kelkajn horojn da esplorado, kiujn verŝajne neniu volas disponigi al tiu tasko."

Denove praviĝas la abortigo de la debato, kiu, ĉiuokaze, limiĝus al ĝeneralaj ideoj, sen tuŝi realajn faktojn, ĉar la novaj "rakontoj" estas, senesplore kaj antaŭjuĝe, taksataj nefidindaj pro tio, ke ili venas el "alternativaj" novaĵfontoj. Do, ni debatu, se entute, pri abstraktaĵoj, sed ne pri la realo. Ĉi tio estas peza laboro postulanta "horojn da esplorado", kaj ne vere bezonata, ĉar la "rakontoj" estas, tutcerte, plene refuteblaj, ĉar ricevitaj per fiaj novaĵfontoj. Resume: "rakonto" ne konformas al niaj antaŭjuĝoj, kaj ni ne pretas perdi tempon esplorante la faktojn por refuti tion, kion ni taksas, antaŭesplore, falsaĵo. Nenio nova sub la suno. Temas pri tradicia sinteno de ĉiuspektraj laboristmovadanoj, kiuj parkerigas la nerefuteblajn principojn, kiuj aperas en la sanktaj skribaĵoj de la por-laboristaj profetoj, kaj prifajfas la realajn faktojn, aŭ distordas ilin ĝis konformigo kun tiuj sanktaj principoj. Nenio debatinda.

"Tio, kion mi juĝas maloportuna, estas longe tiriĝantaj debatoj inter anoj de la tendenco kutime nomata dekstra-popolisma kaj la aliaj sur la paĝoj de *Sennaciulo*, kvankam mi neniel proponas malpermesi tion. Reagi ĉe la unua apero de opinioj el tiu tendaro povas necesi, sed, ĝenerale parolante, ne povas esti la celo de SAT faciligi debatojn inter ĉiuj politikaj tendencoj (...)".

Nova elturniĝo por pravigi la blokadon de debatoj. Ni restu puraj. Ni limigu nian opinio-spektron por ke ĝi ne eliru el la kadro de nia tradicia repertuaro. Estas "politikaj tendencoj", ekzemple la "kutime nomata dekstra-popolisma", kiuj ne meritas nian atenton. Ĉio, kio venas el tiaj fiaj politikaj tendencoj, estas refutebla. En ili, veraĵoj ne povas esti entenataj. Maksimume, ni respondu al ili unufoje, sed debatoj ne estas dezirindaj, ĉar tiaj aĉuloj havas nenion pozitivan por alporti. Ni parolu nur inter ni mem. Ni ne poluiĝu per tiaj opinio-interŝanĝoj. Ĉi tiu rezonado forgesas, ke la debatoj okazas inter konkretaj fizikaj personoj, kies ideo-universoj estas tre mal-similaj, kaj ke la limojn de la diversaj tendencoj ne eblas klare difini. Fakte, eroj el, unuavide, tre malsimilaj tendencoj miksiĝas en ĉiu konkreta individuo. Inter la laboristoj, de ni aparte celata soci-tavolo, renkonteblas ĉiu ajn imagebla ideologio. La aserto, ofte aŭdata, ke la laboristoj estas maldekstremaj, estas absolute kontraŭa al tio, kion la realo daŭre montras. Por pravigi tiun antaŭjuĝon,

nia ĉioscianta gvidanta intelektularo argumentas, ke, se tio ne okazas, estas pro la efiko de la propagando de la dominanta klaso, sed, eĉ supraĵa kontakto kun realaj laboristoj ebligas konkludi, ke multaj el ili estas firme konvinkitaj ne-maldekstruloj bazantaj siajn starpunktojn sur fortaj argumentoj. Ĉu ni baru la debatadon inter laboristoj en nia asocio, dum surstrate tiaj debatoj estas normala ĉiutagaĵo?

"Mi kontraŭas ankaŭ la uzadon de tiu foto kvazaŭ ĝi estas konfirmo de la asertoj de la artikolo. (...) Por tiu artikolo eble taŭgus plie foto de la lastaj okazaĵoj en kiuj grekaj ekstremdekstruloj atakis rifuĝintojn."

Kiel dirite, mi estas la nura responsulo pri la publikigo de la aperanta foto, kiun mi mem serĉis kaj elektis. Mi taksis ĝin, kaj daŭre tiel pensas, plej konforma al la enhavo de la teksto. Al mia kapo ne venis la ideo ilustri ĝin per bildo simila kiel tiu, kiun proponas la kritikanto, ĉar, laŭ mia vidpunkto, agi tiamaniere estas nehoneste, ĉar tio montrus, ke la redaktejo ne tenas la bezonatan neŭtralecon respekteman kun la libera esprimado de la opinioj de niaj membroj, sed provas ruze gvidi la penson de la legantoj, infanece traktataj, kvazaŭ nekapablaj eltiri siajn proprajn konkludojn per si mem. Plej signifoplena estas la argumento utiligata por pravigi la anstataŭigon de la bildo. Ĝi devas esti forigita, ĉar la uzado de tiu foto kvazaŭ konfirmas la asertojn de la artikolo. Do, la priskribitaj faktoj estas antaŭjuĝe konsiderataj neveraj, kaj la foto, kiu rekte rilatas al tiuj faktoj, devas malaperi por eviti ties konfirmon. Ridinde. Anstataŭ peni kiel eble plej sobre kaj funde studi la realon, kaj disvolvi niajn starpunktojn surbaze de ĉi tiu esplorado, oni preferas prifajfi la faktojn, kiuj ne konformas al la propraj ideologiaj konvinkoj, kiuj, siavice, estas eltiritaj el sanktaj netuŝeblaj tekstoj, senkritike legitaj kaj, ne malofte, aŭtoritaj antaŭ pli ol unu jarcento. Sekvi ĉi vojon kondukas al izoliĝa fanatikeco kaj, longperspektive, al la plena forpereo.

PEDRO SANZ

# Vizito de la unua E-delegacio al CIRA (*)

En pasintaj jaroj ĝin nur sporade vizitis Esperantistoj.

La centro estas facile atingebla el stacidomo per t.n. "Metro", senpilota trajneto almonta, kiu haltos apud hospitalo.

Afable bonvenigis nin tri skipanoj de CIRA: Auane, Gabriel, Chri.

Ili enmanigis al ni ampleksan liston de E-literaturo de anarkiismo. La unua titolo estas raporto pri la anarkiista kongreso en Amsterdamo de aŭgusto 1907 – en ĝi ne mankis la dek ses reguloj.

El la jaro 1850 datiĝas la unuaj libroj de anarkiistoj. La parolado de Mikaelo Bakunin al laboristoj en Saint-Imier estas inter ili.

Volontuloj katalogas, skanas kaj ordigas la donacitan materialon, ankaŭ son- kaj vid-bendojn. La centro financas sin per libervolaj kotizoj, mondonacoj kaj, foje, per la svisa loteria fonduso, kiu subvencias apartajn kulturajn eventojn. La centro estis konstruita en la jaro 1957 kun helpo de libervoluloj; ĝi fondiĝis pro la fortaj pacista kaj kontraŭ-militista movadoj, precipe de Ĝenevo.

En la arĥivo multaj publikaĵoj devenas el SAT. Eĉ legeblas letera interŝanĝo inter Lanti kaj Privat – duono en la franca, duono en Esperanto. La kolekto de *Sennaciulo* ĉesis, ĉar la CIRA taksis la enhavon komunisma.

Anarkiistoj ne ekzistas oficiale en Laŭzano, sed ja estas multaj liberaj individuoj, kiuj kolektiĝas, ekzemple, en la alternativa centro *l'espace autogéré*.

Inter la nuntempaj anarkiemaj aŭtoroj oni menciis Bookchin, Gretert, P.M. kaj Chomsky. La kunlaborantoj de CIRA ĉiumonate kunvenas por diskuto. La centro kunlaboras tutmonde, kunorganizas libro-foiron pri anarkiismo.

La anarkiistoj ne partoprenos la celebron de la 100-jara datreveno de la ĝenerala striko en Svislando.

Ekde tiu ĉi jaro tamen formiĝis ĥoro kun anarkiisma repertuaro – kiu ofte koincidas kun kantoj de komunistoj.

La venontaj kant-provoj okazos je la lundoj, je la 5-a kaj la 9-a de novembro kaj je la 3-a de decembro 2018 en *l'espace autogéré* (lachorale@protonmail.com ).


*Raportis:* Dieter Rooke
*Oktobro 2018*

(*) Centre International de Recherches sur l'Anarchisme (Internacia centro de esploroj pri anarkiismo) - Avenue de Beaumont 24, CH-1012 Lausanne.




**Enirejo de CIRA**

# Recenzo pri Anarkio




***Anarkio*, de Errico Malatesta. Traduko, enkonduko kaj notoj de Carlo Minnaja. Eldona Fako Kooperativa de SAT. Parizo. 2018.**

"Estu realisto, alstrebu la utopion". Jen unu el la plej renomaj devizoj distrumpetitaj de la gejunuloj (ĉefe studentoj), kiuj antaŭ, ĝuste, 50 jaroj ĉefrolis en la ondo da gravaj protestoj konata kiel "Franca Majo" aŭ "Majo 1968". Vera revolucio, kiu ne malmultajn konceptojn, aspirojn, kondutojn kaj vivmanierojn ŝanĝis. Tiuj francaj studentoj montris fortan simpation al anarkiismo kaj rifuzon al la tiamaj sindikataj kaj politikaj strukturoj, kies dogmemo, aŭtoritatismo kaj burokratismo ne plaĉis al ili. Tia mondrigardo kaŭzis, ke multaj laboristoj kaj studentoj, kvankam ligitaj al ĉiuj kontraŭstarantoj de la tiama franca prezidento Charles de Gaulle, rifuzis la gvidan rolon de la partioj komunismaj kaj socialismaj forneante la validecon de ilia aŭtoritato. Ja la pulsado de "Majo 1968" igis flui liberecanajn esprimojn ie ajn, elŝirante ilin el la etaj "getoj", kie ili loĝis, kaj subite projekciante ilin sur la homamasojn por ke ĉi tiuj ilin alproprigu al si kaj rekreu en sia maniero. Kaj tiel estis.

Nu, kial mi komencas mian recenzon de *Anarkio* per laŭdo al la "Franca Majo"? Unue, ĉar tiu revolucio meritas esti laborist-medie priomaĝata en sia 50-jariĝo, des pli en la prezentado de anarkiisma libro. Due, por emfazi la konstantan validecon de la anarkiisma korpuso da vidpunktoj, konata kiel "la Ideo", kiun kelkaj volas aperigi kiel jam kadavran deknaŭajarcentan anakronismon kaj kiel iaman naivan religiecan kredon. Tiuj malpravas. Anarkiismo estas ajnatempa maniero solvi kiel eble plej bone kaj racie la sociajn aferojn, respektante la maksimuman liberecon de ĉiu homo, sen helpi sin per registaraj arbitracioj, ĉiamaj fontoj de novaj privilegioj. Resume, temas pri apliko de du valoraj principoj: maksimuma libereco kaj integra federismo, nome pri pleja aktualaĵo. Do aperigo de esperantigita verko de anarkiisma klasikulo, ĉefe se digne prezentita, kiel ĉi-okaze, meritas nian aplaŭdon.

"*Ce n'est qu'un début, le combat continue*" [Ĉi tio estas nur komenco, la batalo pluas]. Jen unu el la devizoj plej kriataj, eĉ kiam la batalo estis tuj finiĝonta, dum la manifestacioj en la "Franca Majo". Prave. Poste ne magra nombro da protestoj dotis sin per iel liberecana karaktero. Pli proksima al mi en la spaco kaj al ni ĉiuj en la tempo estas la tiel nomata "15M-Movado" [Movado de la 15a de Majo]. Ali-maje, en 2011, la hispana junularo ĉefrolis en unu el la plej gravaj kaj drastaj protestoj lastatempe okazintaj en Hispanio kontraŭ la nun regantan socian-ekonomian modelon. Inspirite de Stéphane Hessel, pere de lia libro *Indignez-vous!* [Indignu!], gejunuloj amase manifestaciis en diversaj hispanaj urboj kontraŭ la farson de la novliberalisma demokratio. Temas pri la t.n. "indignuloj". La indignuloj kolektiĝis en la ĉefaj placoj de la hispana teritorio kaj, spite minacojn kaj disajn atakojn far la polico, tie tendumis tage-nokte, organizis amasajn asembleojn, kulturajn aranĝojn ktp kaj pruvis, ke alia mondo eblas, ke popola demokratio eblas.

La bazo de tiu movado plej heterogenis kaj plurfacetis. Spicis ĝin komponantoj liberecanaj (mem-organiziĝo, ordo sen ĉefoj kaj estroj, respondeco kiel rezulto de scio kaj libero...), 1968-majecaj ("ni volas ĉion kaj volas ĝin nun"), Gandhi'ece pacismaj, ekologiismaj... Kaj en nur unu monato la indignuloj sukcesis mobilizi amasojn da simpatiantoj junaj kaj maljunaj, atingi apogojn kaj ĉeeston de personoj el plej diversaj soci-tavoloj, altiri al si la atenton de la ekstera mondo, la simpation de multaj alilandaj homoj kaj grupoj (francoj, britoj, grekoj, israelanoj, usonanoj ktp) pretaj reprodukti ĉi movadon, kiun ili nomis *Spanish Revolution* [Hispana Revolucio], sia-lande.

Al tiuj gejunuloj mi dediĉis la finan parton de mia poemo *Apostolo de la Ideo*, de mia lasta poemaro, *Rev-ene*, ĉi-jare publikigita de Eldona Fako Kooperativa de SAT:

*Kelkaj el la viuloj vin ne vidis.*
*Ne sciis vidi vin, ĉar ili kredas,*
*ke vi aperos nepre kun barbo Kropotkin'a,*
*sed vin ornamis tamen feltharoj [1] Bob-Marley'aj.*

Pro ĉio ĉi gravas legi la anarkiismajn klasikaĵojn kun nuntempaj okuloj. El la legio da klasikaj pensuloj kaj teoriuloj pri anarkiismo elstarigindas la kvaropo konsistigata de la franco Pier Joseph Proudhon (1809-1865), la rusoj Miĥail Bakunin (1814-1876) kaj Pjotr Kropotkin (1842-1921) kaj la italo Errico Malatesta (1853-1932). Post tiuj nomoj venis multaj pliaj, sed ne ĉiuj liberecanoj aŭ fakuloj pri la temo samopinias pri tio, kiuj el



**Ángel Cappelletti**

tiuj postaj aŭtoroj plej gravis aŭ plej multe alportis al la anarkiisma principaro. Iel aŭ alie, la loko asignita al la tri unuaj el la menciitaj nomoj nekontesteblas ĉe anarkiistoj. Rilate al Malatesta, ŝajnas, ke ne ekzistas absoluta akordo pri liaj alportoj aŭ pri la originaleco de lia penso, sed oni tute konsentas pri la fakto, ke li estas fundamenta figuro de anarkiismo kiel diskoniganto de la Ideo kaj pro sia lucideco por nuanci kelkajn rigidajn aspektojn de la filozofio de siaj antaŭantoj. En ne malmultaj liberecanaj rondoj, Malatesta rigardatas unu el la plej grandaj figuroj de la tutmonda politika penso, kaj liaj verkoj, indaj je staro sur la bretoj de ajna universitato. Sed ja nediskuteblas, ke, se io vere karakterizas la figuron kaj la penson de Malatesta, tio estas, ke, kiel ĉiam, ili nun ĝuas bonan sanon. Nuntempe dekoj da liaj skribaĵoj plu kaj plu reeldoniĝas kaj multaj el liaj plej memorindaj frazoj citatas en libroj kaj ĉiuspecaj publikaĵoj. Ankoraŭfoje do mi substrekas la oportunecon eldoni la libron *Anarkio*.

Jen kiel ĉi-jare aperinta hispana-esperanta manlibreto pri anarkiismo [2] resumas la figuron de Malatesta:

"Errico Malatesta (1853-1932) estas la granda disvastiganto de anarkiismo pere de ĉiaj rimedoj je sia atingo (gazetaro, prelegoj, propagando per la ekzemplo, publikaj polemikoj, broŝuroj... eĉ teatro!). Li rigardas kiel celon de la anarkiisma propagando detrui la aŭtoritat-principon, ĉar la revolucio detruos ajnan forton kapablan devigi la homojn agi kontraŭvole. Li estis entuziasma partiano de la organiziĝo de la anarkiisma movado en grupojn kaj federaciojn por diskonigi la ideologion, agiti la konsciencojn kaj impulsi la revolucion".

En sia enkonduko al *Anarkio*, Minnaja prezentas ampleksan biografion de Malatesta indan je la skripto [3] de intrigo-plena filmo, kiel kutime estas la biografioj de multaj anarkiistoj kaj, ĝenerale, de batalantoj por diversaj formoj de socialismo. Sed, krom i.a. la esperantigo far Minnaja de *Il canto dei malfattori* [La kanto de la misagantoj] pri la proceso kontraŭ Malatesta en Lugano, en 1891, tiu enkonduko enhavas du aferojn al mi aparte interesajn. Jen la unua el ili: sciigo (por mi surpriza), ke Malatesta estis esperantisto. Sciigo ilustrita per intervjuo farita de Lanti mem al la itala anarkiisto kaj aperinta en *Sennacieca Revuo* en julio 1924.

Pri la, miaopinie, dua aparte interesa afero en tiu enkonduko mi sciiĝis siatempe. En 1978. Tiujare premieris en Madrido la hispana versio de la itala dramo *Morte accidentale di un anarchico* [Akcidenta morto de anarkiisto], de la granda itala dramaturgo kaj aktoro Dario Fo (1926-2016), kiu poste, en 1997, ricevis la Nobel-premion pri Literaturo. En Italio, tri jarojn post la premiero en 1970 de tiu teatraĵo pli ol unu miliono da homoj estis ĝin spektintaj. En Hispanio, kiomfoje ĝi prezentatas, ĝi konas grandan sukceson. Tiam mi sciiĝis, ke la verko havas realan bazon, i.a. la morton de la itala anarkiisma fervojisto Giuseppe "Pino" Pinelli post ol li, plej probable, estis ĵetita tra fenestro en polickomisarejo. Tie li pli frue estis pridemandata kiel akuzito pri terura perbomba atenco, kiu kaŭzis 17 mortintojn kaj 87 vunditojn, ĉe la Banko de Agrikulturo, en Milano, en 1969. Nelonge poste oni sciis, ke la atencon fakte plenumis novfaŝismaj organizoj. Nun oni rigardas la sekretajn servojn de pluraj NATO-landoj kiel intelektajn aŭtorojn de la tragedio.

Nu, en 1980, post mia esperantistiĝo, oni parolis al mi pri la esperantisteco de Pinelli kaj de ties edzino. En 2009, dank' al artikoloj de mia SAT-kamarado kaj amiko Toño del Barrio, la nuna HEF-prezidanto, krom historiisto pri la laborista E-movado, en hispanlingvaj liberecanaj retforumoj mi sciiĝis pri grava evento, aperinta en la retejo "la Repubblica.it", kiu min agrable surprizis. Temis pri oficiala omaĝo de la tiama Prezidento de la Itala Respubliko, Giorgio Napolitano, al "ĉiuj viktimoj de la tempo de malamo kaj violento", en aludo al la jaroj inter la fino de la 1960aj kaj la komenco de la 1980aj, alnomataj "jaroj el plumbo". Toño precizigis, ke en tiu omaĝo en Romo, la Prezidento dediĉis apartan rememoron –li citis el Napolitano– "al la senkulpa Pinelli, kiu estis duobla viktimo, unue pro senbazaj suspektoj kaj poste pro sia fino subita kaj absurda".

En sia enkonduko, Minnaja ampleksigas la informojn pri la esperantisteco de Pinelli kaj la edzino kaj pri la cirkonstancoj de la trista evento, en kiun "Pino" vidis sin implikita, kaj finas tiun temon per jena bela sciigo, kiun li dankas al D-ro Antonio De Salvo:

"En marto 1980 aperis speciala numero de *La questione sociale*, la reviviĝinta liberecana gazeto fondita de Errico Malatesta: ĝi estis en esperanto kun sur la unua paĝo la portretoj de Zamenhof kaj Pinelli. Inter ili oni legas vortojn de la redakcio: "Ni opinias, ke la plej bona maniero celebri ambaŭ, estas cirkuligi, pere de la mirinda esperanta idiomo, nian malgrandan sperton pri batalo kaj engaĝiĝo kune liberecanaj kaj esperantistaj, tiele kontribuante al komuna laboro de la liberecanoj kaj de la esperantistoj por efektiva lingva kaj socia internaciismo".

Post tiu enkonduko, aperas la esperantigo far Minnaja de du eseoj de Malatesta. La unua estas *Anarkio*, publikigita de la itala majstro pri anarkiismo en 1907. Ĉi verko, kiu donas titolon al la tuta libro, priskribas al ni simple kaj alireble la esencon de la vidpunktoj de la aŭtoro. Ĉi-esee la koncepto Ŝtato estas subtile fragmentigita tiel, ke oni anstataŭigas kontrolon per konscienco, konkuradon per interhelpo, naciismon per internaciismo, kaj bildigas ekvilibron inter individuo kaj kolektivo, survoje al libero. Provante detaligi la kompleksecon de la kapitalisma sistemo, la aŭtoro malkovras al ni plej diversajn flankojn, agantojn kaj karakterizojn de la Ŝtato. Li volas igi nin kompreni la sociajn problemojn ŝprucantajn el la diversaj kontrol-taktikoj kaj klopodoj uzataj de la Ŝtato por tenadi sian statuson, laŭ kiu nur kelkaj posedas la regpovon kaj la havojn, dum la grandega plejmulto da homoj ĉiam pli malriĉiĝas.

El la multaj ideoj ĉi-esee esprimitaj,



**Giuseppe Pinelli**

mi citas jenan, kiun mi rigardas esenca:

"Anarkio, same kiel socialismo, havas kiel bazon, kiel startopunkton, kiel necesan medion la *egalecon de kondiĉoj*; havas kiel lumturon la *solidaron* kaj por metodo la *liberon*. Ĝi ne estas la perfekteco, ĝi ne estas la idealo absoluta kiu, samkiel la horizonto, malproksimiĝas ĉiam pli laŭ kiom ni antaŭenvenas; sed ĝi estas la vojo malfermita al ĉiuj progresoj, al ĉiuj perfektiĝoj faritaj en la intereso de ĉiuj".

Ja tie priskribatas socialisma socio en la konsidero, ke socialismo egalas punkton ne finan sed komencan ene de procezo, kies fino apertas. La lumturo de tiu procezo estas la solidaro. Asignante la gvidan rolon de la socia evoluo al intence celata valoro, Malatesta esprimas konceptadon esence vol-dependan, kontraste kun la marksisma emfazo pri disvolviĝo de produktivaj fortoj. Kaj asignante tian rolon al la solidaro, li rifuzas individuismon. Fine, pledante por la libero kiel metodo, Malatesta plifirmigas sian defendon de la libera iniciativo, kontraste kun la aŭtoritatisma socialismo. Malatesta do proponas planon por la futura socio, sed lian difinon forte karakterizas la ĉi tie traktata procezo: li priskribas socialisman socion apertan, eksperimenteman kaj plurecan.

La dua eseo en la libro *Anarkio* titoliĝas *Nia programo*. Temas pri la programo pri anarkiisma agado ellaborita de Malatesta en 1903 kaj adoptita de ĉiuj anarkiismaj organizoj. Ĉi teksto servas por bildigi la laboron de la anarkiismaj batalantoj en la komenco de la pasinta jarcento kaj kiel programa referenco atentinda por kiuj interesiĝas pri la anarki-komunismaj celoj aŭ vidas ilin kiel siajn.

Por la esperantigo de ĉiuj ĉi tekstoj Minnaja rakontas fine de sia enkonduko, ke li klopodis fideli al la stilo de la originalo, karakterizita de longaj frazoj "kun intermeto de longaj subfrazoj kiuj siavice entenas subfrazojn ofte kun rilativaj pronomoj". Tio ja konstituas veran defion kadre de Esperanto, kies vortoj, ĝenerale, konsiderinde longas, ĉar ili esprimas, krom sia semantika konsisto, sian morfologian karakteron; kies rilativaj pronomoj ("kio", "kia", "kiu" ktp) kaj ĉefa verbo ("esti") dusilabas, samkiel la posesivoj, ktp ktp ktp. Skribante esperantan tekston, oni kutime penas por eviti la pezajn elementojn de la lingvo kaj kompleksajn formuladojn tiel, ke la skribaĵo aperu laŭeble leĝera kaj unualege komprenebla sen stumbloj. Mi konfesas, ke, kvankam uzanto de la hispana, t.e. de lingvo latinida (dotita do per sintaksa lukso nekonceptebla en multaj nelatinidaj lingvoj), mi devis dufoje legi kelkajn longajn frazojn en *Anarkio*, ĉar unualege mi perdis la fadenon de la rakonto. Tion spite, la rezulto de la defio de Minnaja estas sufiĉe kontentiga. Legante la paron da eseoj en *Anarkio*, ni iel aŭdas la voĉon de Malatesta kvazaŭ en oratorado.

Anarkiismo, samkiel Esperanto, estas afero de la paseo, de la nuntempo kaj de la futuro. La argentina filozofo, historiisto kaj anarkiisto Ángel Cappelletti (1927-1995), spertulo pri la klasika kaj nuntempa, tiel sociologia kiel politika, penso, vortumis jenon:

"Oftas la fakto, ke historiistoj kaj sociologoj, kiuj nun okupiĝas pri anarkiismo, asertas, ke ĝi prezentas ideologion el la paseo. Se per tio ili volas diri, simple, ke tia ideologio atingis sian maksimuman influon sur la popolon kaj sur la laboristan movadon fine de la 19a jarcento kaj dum la unua jardeko de la 20a, nenion ni obĵetas. Sed, se tiu juĝo implicas la ideon, ke anarkiismo estas io morta kaj esence neadekvata al la nuntempa mondo, se tiu juĝo celas esprimi, ke anarkiismo ne povas interpreti nek ŝanĝi la hodiaŭan socion, ni kredas, ke tio konstituas evidentan eraron. Fronte al la grava teoria kaj praktika krizo de la marksismo, baraktanta inter ia plimalpli hontema stalinismo kaj ia socialdemokratio, kiu kutime forneas sian paseon, anarkiismo prezentas ja la ideologion de la futuro. Ŝajnas, ke sociaj klasoj, grupoj kaj kolektivoj subpremataj en la unua, dua aŭ tria mondo ne havas alian revolucian solvon. Sed nedubeblas, ke tiu "anarkiismo" de la futuro (nutrata per ekologiismo, pacifismo, feminismo, antiburokratismo, kaj ankaŭ per la plej viva parto de la marksismo, surbaze de nova kaj pli profunda kritiko al la Ŝtato) ne malmulte diferencos forme kaj esence disde la klasika anarkiismo".

Permesu al mi adiaŭi per jena hajko el mia jam menciita nova poemaro, *Rev-ene*:

*Nun utopio*
*kaj morgaŭ luma fakto:*
*la anarkio.*

Miguel Fernández

**Notoj:**

[1] La termino 'feltharoj' aperas en Vikipedio. Jen la en ĝi legebla difino: "Feltharoj (aŭ rastabukloj) estas hararanĝo en kiuj la haroj estas kuniĝintaj en dikajn feltecajn tufojn. Ĝi povas okazi nature post longa nekombado kaj estas kutima inter rastafarianoj, kaj nuntempe ankaŭ inter regee influitaj junuloj en Okcidentaj landoj. En multaj aliaj kulturoj oni tradicie feltigas siajn harojn, interalie ĉe sadhuoj en Barato. En la angla kaj multaj aliaj lingvoj, la nomo de feltharoj estas *Dreadlocks*. *Dread*, t.e. « timo », aludas timon de dio".

[2] Temas pri la dulingva (hispana-esperanta) manlibreto *¿Qué es el anarquismo? / Kio estas anarkiismo?*, de Alfredo González, en esperantigo de Miguel Fernández. Eldonejo Antorcha. Madrido. 2018.

[3] " "Skripto" (vorto ne en PIV) estas antaŭteksto de kultura produkto: filmo, prelego, intervjuo, romano (ekzemple tajposkripto) ktp. Se por filmo, oni jen kaj jen uzis la francismon "scenaro" (jes en PIV); tamen la skripto de filmo enhavas ne nur priskribojn de la scenoj, sed ankaŭ la parolojn de la aktoroj kaj multajn aliajn detalojn, eĉ desegnojn. Verkiston de skriptoj oni nomas "skriptisto" ". (Vikipedio).

NEKROLOGO

# Renata CHASSARD CAUBEL

## FORPASO DE EMINENTA SAT-ANINO

Filino de André CAUBEL, grava SAT kaj SAT-Amikara aktivulo dum la 20a jarcento, Renata estis denaska esperantistino. Ankaŭ ŝi longe aktivadis kadre de SAT (matr. 32014) kaj SAT-Amikaro. Ekzemple en la jaro 1976 ŝi animis la infan-kongreseton de la SAT-kongreso en Lekturo (FR-32) kaj lastatempe ŝi partoprenis en la Jalta kaj Dinana SAT-kongresoj. Ĉiam ŝercema kaj ridema, Renata tre ŝatis homkontaktojn. Frua vidvino, ŝi sole vivtenis siajn gefilojn, inter kiuj tri ĝemeloj. Kiel nutristino en la Aĝena hospitalo, ŝi ne kalkulis la horojn, kiujn ŝi dediĉis al alies sano. Kiel radioamatoro, ŝi praktikis esperanton tra la ondoj; ŝi nutris noktajn kontaktojn kun orienteŭropanoj, kiam fera kurteno dividis nian kontinenton, aŭ kun sudamerikaj aŭ aziaj samhobianoj. Kun Kribo, ŝi estis ĉefrolantino de la loka Aĝenia Esperantista Rondo. 80-jara ŝi estingiĝis la 21an de septembro 2018, postlasante vakan postenon de Ĝenerala Konsilanto de SAT. Kiel verda sanprizorgantino, ŝi bedaŭris nur ke ŝiajn gefilojn ne infektis la esperanta viruso. Ni sincere kondolencas al la gefiloj de Renata, ankaŭ al Jacques Caubel, kaj iliaj familianoj.





# NOVAJ ALIĜOJ

| | | | |
|---|---|---|---|
| 36116* | DIMITRIJEVIĆ Dragana | RS 18000 - NIŜ | Serbio |
| 36117 | NIKOLIĆ Jovan | RS 18000 - NIŜ | Serbio |
| 36118 | NEŠIĆ Mihailo | RS 18000 - NIŜ | Serbio |
| 36119 | MARCANDALLI Bruno | IT 20122 - MILANO | Italio |
| 36120 | LIU Zhi | CN 2100048 - NANJING | Ĉinio |
| 36121* | PÉREZ Lola | ES 03141 - GUARDAMAR | Hispanio |
| 36122 | WIERZBOWSKI Przemysław | PL 015446 - BIAŁYSTOK | Pollando |
| 36123 | BINDMANN Dirk | DE 06712 - ZEITZ | Germanio |
| 36124 | HANSEN-OFS Eugenio | BR 90420-140 - PORTO ALEGRE | Brazilo |
| 36125 | HENNEMAN Georg | DE 35683 - DILLENBURG | Germanio |
| 36126 | PAGAIME André Jorge | PT 2870-354 - MOITA | Portugalio |
| 36127 | de KOCK Laurens Eduard (Ward) | NL 3311-TT - DORDRECHT | Nederlando |
| 36128* | MURESAN Bianca | FR 06200 - NICE | Francio |
| 36129 | ATHANASE Gérald | FR 39320 - VAL-SURAN | Francio |



# Mia liriko kaj la muziko

### Programero de SAT-kongreso 2019


En julio 2018, vidis la lumon mia tria poemaro, *Rev-ene*, publikigita de SAT – Eldona Fako Kooperativa. Rev-ene kaj re-vene. Jen la ŝlosilo. Ĉar per ĉi verko mi revenis al pluraj aferoj, inter ili al la revo vibradi ene de la originale esperanta poezio, 22 jarojn post ol aperis mia dua poemaro, *El miaj sonoraj soloj*. Sed Poezion (kun majusklo) neniam mi forlasis. Ĉiutempe mi kultivis ĝin, ĉu en ties aspektoj traduka, proza, deklama... ĉu en la formo de muziko. Poemoj kaj muziko. Jen la du ekvilibro-polusoj, ĉirkaŭ kiuj disvolviĝas kaj mia amo al Poezio kaj la tuta poemaro Rev-ene, kiun mi strukturis kiel pripoemitan omaĝon al diversaj muzikaj formoj: preludo, kanto, sonato, simfonio, konĉerto...

Ĝuste pro tio, ideala publika prezentado de Rev-ene devus enhavi deklamojn, muzikon kaj kantojn. La 92an SAT-Kongreson, en mia amata Barcelono, mi rigardas perfekta kadro por tion efektivigi. Do mi konceptis aranĝon, *Mia liriko kaj la muziko*, ene de kiu mi, kun muzik-akompano, deklamos poemojn el la tri areoj (soci-kritika, ama kaj omaĝa) konsistigantaj ĉi libron kaj interpretos diversspecajn kantojn, inkluzive oper-ariojn. Pluraj geamikoj helpos min en la deklama tasko.

Bele, se, dum la disvolvo de nia programero, ni kune atingos la venon de Poezi-feoj kapablaj vibrigi la plej internajn kordojn de la animo de ĉiu ĉeestanto!

Sanon kaj Poezion!

Miguel Fernández




# Kooperative kaj esperante en Porto!

### Lerni Esperanton por partopreni SAT-kongreson




De la pasinta oktobro 2018 okazas ĉiuĵaŭde lecionoj de Esperanto en Unicepe - Cooperativa Livreira de Estudantes do Porto, CRL. Temas pri kooperativo de studentoj kaj libristoj kreita en 1963, grava kiel spaco de libera, amika kaj komunuma edukado. 26 komencantoj lernas Esperanton per kurso kiun organizis Rui Vaz Pinto kaj gvidas ni mem. La celo estas plu lerni, krei Esperanto-grupon niaurbe kaj espere partopreni la venontan kongreson de SAT en Barcelono.

Ĉi-decembre ni tie festos zamenhofan tagon per libro-prezentado ĉar la tradukisto, poeto, eseisto kaj najbaro Suso Moinhos nin vizitos el Vigo, kuna manĝado kaj muzika momento, aldkoncerto de José Valente, portano kaj elstara nuntempa artisto. Dume kaj kune ni progresas.

Roger kaj Xana

# Can Masdeu



## UNU EL LA FONDINTOJ PARTOPRENOS LA VENONTAN SAT-KONGRESON

Dum la barcelona kongreso oni vizitos Can Masdeu, simbolo de alternativa vivmaniero en Barcelono. Temas pri memmastrumata socia centro kaj komunumo de preskaŭ 30 personoj, ene de naturparko Collserola, ne malproksime de la kongresejo. La forlasitan lepromalsanulejon okupis internacia grupo en 2001, post 50 jaroj de neuzo. La terojn ĉirkaŭ la domo kultivas najbaroj de kvartalo Nou Barris.

Unu el la fondintoj de Can Masdeu estas Brian Rusell, kiu partoprenos la venontan SAT-kongreson. En intervjuo al revuo *Kontakto* (numero 287, 2018:5 paĝoj 5-7), Brian klarigas la originon de tiu projekto: "Mi kaj aliaj 8 amikoj serĉadis lokon por organizi tutmondan renkontiĝon por aktivuloj kontraŭ la klimata ŝanĝiĝo. Kiam ni vidis la forlasitan leprulejon kaj bienon, ni ne povis kredi ke ĝi restis malplena kaj neuzata dum duonjarcento. Estis granda loko, ĝuste tio, kion ni bezonis. Do, ni okupis Can Masdeu en 2001 kaj okazigis renkontiĝon. La loĝantaro rapide kreskis ĝis 30 homoj. Estis nekredeble bela loko, apud la urbo sed tute natura, preskaŭ oni ne sentas sin en urbo de miliono da personoj, oni aŭskultas nur birdojn, bufojn kaj insektojn." Kompreneble, la aŭtoritatuloj eventuale reagis al la defio: "En aprilo 2002 alvenis policistoj por forĵeti nin, sed ni estis preparitaj kaj povis defendi la domon per senperforta rezistado kaj amaskomunikila strategio, krom la invado de pli ol 100 policanoj. La sieĝo daŭris dum tri tagoj, kaj en la unua tago ĝi estis tutbarcelona novaĵo, en la dua tago estis tuthispana kaj en la tria tago ĝi estis tuteŭrope televidata. En la tria tago, kun pli ol 400 manifestaciantoj apud la domo, la juĝisto decidis fortiri la ordonon de eldomigo".

Interalie, Brian estas esperantisto, pluramemulo, liberkomputilisto... kun interesegaj vivspertoj: "Mi naskiĝis en Usono, kaj ekde infano mi estis pacisto, anarkiisto kaj amanto de naturo. Pro tio, mi malamis la usonan militemon kaj deziris iel fuĝi. En mezlernejo mi decidis fari jardaŭran viziton al Aŭstralio per studenta kulturinterŝanĝo. Mi decidis por Aŭstralio pro timo pri lingvolernado. Mi malsukcesis kaj suferis en mezlernejo pro lingva studado — la franca — do kiam mi min proponis iri alilanden, mi limigis la eblojn nur al angloparolantaj landoj. Kiam mi alvenis aŭstralien, mi vidis ke la aliaj eksterlandaj interŝanĝaj lernantoj tre rapide lernas la anglan, kaj mi bedaŭris mian decidon, do decidis lerni Esperanton dum tiu jaro. Estis tre bona decido, kiu malfermis al mi multajn pordojn. Post tiu jaro, mi ekvojaĝis per Pasporta Servo al Rusio, Pollando, Turkio k.a. kaj estis nekredeble bona sperto. Mi enamiĝis al vojaĝoj, kulturoj, kaj lingvoj. Mi loĝis dum pli ol dek jaroj en pli ol dek landoj, kaj sentis min malpli usoneca kaj pli sennacieca kaj homarano. Kiam mi alvenis al Barcelono, mi trovis fortan socimovadon kaj enamiĝis al la loko, al la lingvo kaj al domokupa movado. Tiel mi fariĝis aktivulo kaj domokupanto. Por mi estis granda plezuro liberi, kaj anstataŭ devige labori, povi esti aktivulo por la medio kaj paco."

Rilate al la socia percepto de Can Masdeu, Brian konfirmas ke la nuna urbestraro bone rilatas kun tiaj alternativaj vivprojektoj: "Dum la amaskomunikiloj plejparte konstruas la imagon de la okupa movado kiel problemiga, ili preskaŭ ĉiam pozitive parolas pri Can Masdeu. La ŝtata kaj la kataluna aŭtonoma registaroj ĝenerale neas ajnan socian konsideron se ĝi kontraŭas la posedecon de riĉuloj. Ofte la posedrajto eĉ superas aliajn homrajtojn. Male, la nuna urbodoma estraro de la [politika] partio Barcelona en Comu venas de la PAH (Plataforma de Afectados por la Hipoteca: Platformo por la Trafitaj de Hipoteko), de la lukto kontraŭ la spekulacio de la bankoj, kiu senposedigis milojn da familioj ekde 2008. Kiel strategion por trovi domojn por senhejmuloj, la PAH fojfoje okupas domojn de la bankoj. Pro tio la urbodomo subtenas socicelajn okupajn projektojn kiel Can Masdeu."

Endas memorigi ke nur 20 bonŝanculoj havos la eblon tendumi senpage en la hejmo de Brian. Interesitoj kontaktu lin rekte al briano@esperanto.cat kaj al satbarcelono2019@gmail.com





# PERANTOJ

**Aŭstralio** – Franciska Toubale
1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete : fran14@bigpond.net.au
**Belgio** – Claude Glady
Rue du Culot, 1 , BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo : 00-32- (0)71 644916
Rete : cglady@arcadis.be
Bankkonto : 750-6373051-18
IBAN : BE 50 750-6373051-18, BIC : AXABBE22
**Bosnio-Hercegovino** – Ivica Horvat
Žrtava fašizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo, Bosnio-Hercegovino
rete : ivica.h@hs-hkb.ba
**Brazilo** – Alex Sousa Santos
Via Principal, P-11, bairro Boa Vista, Green Ville
BR-45027-342 Vitória da Conquista-BA, Brazilo
rete : esperanto1000@gmail.com
tel. (poŝa) : +557 7988011780
**Britio** – Arturo Prent
7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel. : +44.1 .277.22.89.62
Nomo: "SAT SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA"
Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003
BIC: ABBYGB2LXXX, IBAN: GB62ABBY09015657604003
rete : ap_esp-sat21@yahoo.co.uk
**Bulgario** – Metodi Markov
Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario
tel. (fiksa): +359 73882791 (poŝa) : +359 879040403
rete: mam1948@abv.bg
IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF
**Ĉeĥio** –Václav Stibůrek
J. Franka 1731, CZ-25601 Benešov, Ĉeĥio
tel.: +420.737230231, rete: stiburek.v@seznam.cz
IBAN: CZ6620100000002900048738
BIC/SWIFT: FIOBCZPPXXX
**Ĉinio** – BRUNO GUY CLAUDE HENRY
rete: esperanto.bhenry@yahoo.fr
Bankkonto N°6217857500009246684
SWIFT kodo/BIC: BKCHCNBJ970
BANK OF CHINA - HUNAN BRANCH N°593 1, Duan Furong Road (M) CHANGSHA - HUNAN -ĈINIO
**Francio** – Barthélémy Maurau
Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX, Francio
rete: barthelemy.maurau@free.fr
Bankkonto: 1733310 N 020
IBAN: FR82 2004 1000 0117 3331 0N02 070
BIC: PSSTFRPPPAR
**Germanio** – Gary Mickle
Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin, Germanio
rete: gmickle@nexgo.de
**Hispanio** – Pedro Maria Sanz Sanz
Apartado 8042, ES-28080 Madrid
rete : pedrosanzsat@gmail.com
Konto: 0182-9465-65-0200272726 (BBVA)
IBAN: ES48 0182 9465 6502 0027 2726
BIC: BBVAESMM
**Hungario** – Tóth Zsolt
Agyag u. 10, HU-9400 Sopron, Hungario
Tel: +36-20-5188919 , rete: zstoth75@gmail.com
Bankkonto: 11773377-00000354
IBAN: HU55 1177 3377 0000 0354 0000 0000
BIC: OTPVHUHB
**Italio** – Carlo Bourlot
Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO) , Italio
rete : carlo.bourlot@gmail.com
Tel. : 011-39.70.477, Poŝtel.: (+39) 327-327 3993
Poŝtkonto : n-ro 43976158
Kodo IBAN : IT88Z0760101000000043976158,
Kodo BIC : BPPIIRRXXX
**Izraelio** – Jehoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio
rete : b48705544@013.net
**Japanio** – Nakamura Daiŝin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo
rete: sat-peranto-japana@googlegroups.com
Poŝtkonto: 00980-9-37624 SAT-Nihon
**Katalunlingvio**
Viktoro Solé – KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, Hispanio
tel.: +34 93 716 36 33, rete: v.sole@esperanto.cat
**Koreio** – Jung Hyunsoo (Paz)
Gwanggyo-hosu-Ro 356 No.301 (3F), Suji-Gu
KR-448-130 Yongin-Si, Gyeonggi-do
rete : paze23@gmail.com
**Kroatio** – Ivica Ŝĉepanoviĉ (Truto)-poŝte
Otok Brac, HR-21414 Gorni Humac, Kroatio
Tel: +385.21.647.059, Poŝtel: +385.098.182.79.07
rete: ivica.scepanovic1@st.t-com.hr
Poŝtkonto: 3200129804 Splitska banka
IBAN: HR81 2330 0033 2001 2980 4, BIC: SOGEHR22
**Litovio** – Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio
Tel: +37068736457, rete: grazopul@yahoo.com
Bankkonto: LT347300010001720030
BIC/SWIFT kodo: HABALT22, Swedbank
**Malagasio** – Justine (Lala) Ralalarisoa
Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101
Antananarivo, Malagasio
rete : llrespr@libero.it
IBAN: MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112
BIC: BMOIMGMG
**Norvegio** – Cécile Anda
Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio
rete: cmranda@frisurf.no
**Portugalio** – Manuel Luis Pedrosa Alves
Estrada Principal, 79, Morelinho, PT-2710 Sintra, Portugalio
rete: morelinho_sintra@hotmail.com
**Rusio** – Nikolao Gudskov
a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio
rete : nikolao@yandex.ru
**Serbio**
Miomirka Kovačević, Španskih Boraca 32/2, RS-11070 Novi Beograd, Serbio
rete: miomirka.kovacevic@gmail.com
IBAN: RS35160003020011349313
SWIFT/BIC: DBDBRSBG
**Svedio** – Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio
rete: ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com
Poŝtkonto: Svenska arbetaresperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN: SE75 9500 0099 6026 0053 1608
BIC: NDEASESS
**Svisio** – Richard Schneller
Rue Charles-Knapp 20, CH-2000 Neuchâtel, Svisio
rete : rischneller@gmail.com, Poŝtkonto n-ro 25-158577-1
**Tajvano** – CHO Chaoming
12F2, No. 41 , Bijhong Street, TW-80342 Kaohsiung
rete : cmcho@so-net.net.tw
**Ukrainio** – Andreo JANKOVSKIJ
str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio
rete : classs@bigmir.net, telefone : 380 67 99 470 03
**Aliaj landoj**
SAT-Sidejo, 67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio
rete (ĝenerala retadreso): kontakto@satesperanto.org
rete (pri financaĵoj): financoj@satesperanto.org
Tel: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto: 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
eblas pagi ankaŭ al la konto de SAT ĉe UEA: satx-s
aŭ al la konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

# KOTIZOJ 2019

| Lando | Jarkotizo | Lando | Jarkotizo |
|---|---|---|---|
| Argentino | 24 € | Koreio | 36 € |
| Aŭstralio | 52 € | Kroatio | 16 € (120 HRK) |
| Aŭstrio | 52 € | Kubo | 4 € |
| Barato | 8 € | Latvio | 16 € |
| Belgio | 52 € | Litovio | 16 € |
| Bosnio-Herc. | 12 € | Luksemburgio | 52 € |
| Brazilo | 20 € | Madagaskaro | 4 € |
| Britio | 52 € (44 GBP) | Makedonio | 12 € |
| Bulgario | 12 € | Malio | 4 € |
| Ĉeĥio | 24 € | Mongolio | 8 € |
| Ĉinio | 8 € (64 CNY) | Meksiko | 16 € |
| Danio | 52 € | Nederlando | 52 € |
| Estonio | 16 € | Norvegio | 52 € |
| Finnlando | 52 € | Pollando | 16 € |
| Francio | 52 € | Portugalio | 28 € |
| Germanio | 52 € | Rumanio | 12 € |
| Grekio | 8 € | Rusio | 16 € |
| Haitio | 4 € | Serbio | 12 € |
| Hispanio | 40 € | Slovakio | 16 € |
| Hungario | 16 € | Slovenio | 16 € |
| Irano | 12 € | Svedio | 52 € |
| Islando | 36 € | Svisio | 52 € (60 CHF) |
| Israelo | 36 € | Tajvano | 32 € (1120 TWD) |
| Italio | 48 € | Turkio | 16 € (96 TRY) |
| Japanio | 52 € (6700 JPY) | Ukrainio | 8 € |
| Kanado | 52 € (80 CAD) | Usono | 52 € (60 USD) |
| Kolombio | 12 € | | |

**DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €**


*Sennaciulo*
Oficiala organo de SAT

**Asocia sidejo de SAT**
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
*Retadreso:* kontakto@satesperanto.org
*Retejo:* http://satesperanto.org
*Tel:* (+33) 09 53 50 99 58
*Poŝtkonto:*
SAT n°1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org
**Plenum-Komitato de SAT**
*Prezidanto:* Vinko Markovo
*Vic-prezidanto:* Pedro Sanz
*Sekretario:* Diana Riŝar
*Kasisto:* Bruno Henry
*Vic-kasisto kaj eldonestro:* Guy Cavalier
*Ceteraj membroj:* Paz (Jung Hyunsoo), Dieter Rooke, Dominiko Simeone
*Reprezentoj de SAT en la LEA-Komitato:* Paz kaj Dieter Rooke
**Sennaciulo**
*Redaktoskipa kunordiganto:* Vinko Markovo
*Vic-kunordiganto:* Pedro Sanz
*Enpaĝiganto:* Nicolas Raymond
*Ceteraj redaktantoj:* Masako Tahira (Masakato), Gary Mickle, Rob Moerbeek, Grazina Opulskiene, Marcel Redoulez, José María Salguero (Kani), Richard Schneller, Serĝo Sir' kaj Franciska Toubale
*Kontribuojn sendu elektronike al:*
sennaciulo.redaktejo@gmail.com
*aŭ paperpoŝte al*
SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol,
FR-75013 Paris, Francio
*Pri financaj aferoj sendu al:*
financoj@satesperanto.org
*Libromendojn sendu al:*
libroservo@sat-amikaro.org
*Librajn eldonproponojn sendu al:*
pimskrabo@yahoo.fr
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.
Imprimé par/*Presita de:*
TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas dumonate - Bimestriel.
Directeur de la publication: Guy Cavalier
Abonnement annuel/*jara abono:*
France 39 €
Autres pays/*aliaj landoj:* peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.
Dépot légal à la date de parution:
N° CPPAP 05 20 G 86567


> Por la nemenciitaj landoj la ĉi-jara baza kotizo al SAT estas 4 €. La PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj laŭ la geografia zono de la lando.

> **Nura abono al Sennaciulo : 75% de la kotiz-prezo en la koncerna lando.** Pagante ĉi sumon, nemembro povas jaraboni Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.

> Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas, perrete kaj surpapere, Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.

> Help- kaj grupmembroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo, kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.

# Kunsido de SAT-anoj en Koreio

**Dato:** 2018-11-04 (dim.) p.t.m. je la 2a - 4a
**Loko:** kafejo Sandpresso Yongsan Haiel
**Partoprenintoj:** Nam kyoyong (Sonĝo), Park haesim (nova aliĝanto), An gxongsu (KaraAN), Choi manwon (Dekmil), Jung hyunsoo (Paz)

– Sonĝo raportis kaj Park priparolis la etoson de la SAT-Fakkunsido en Komuna Esperanto-Kongreso en Nara. Ni vidis raporteton de k-do Daishin.

– Sonĝo raportis pri Hokkajda Esperanto-Kongreso kaj sia prelego "Pri paco en Korea Duoninsulo".

– Antaŭmendo de PIV 2019: KEA (Korea Esperanto-Asocio) antaŭmendos 40-50 ekzemplerojn. Ni ankaŭ aĉetos PIV-on per KEA. La eldondato de PIV-2019 ankoraŭ ne estis fiksita.

– Paz raportis pri la 91a SAT-Kongreso en Kragujevac kaj sia tiea prelego "Infanlibroj laŭ socia, historia, laborista vidpunktoj".




**Unua bildo el la prelego de Paz en Kragujevac**

– Venonta SAT-Kongreso: la 92a SAT-Kongreso okazos en Barcelono, la 4an-11an de aŭgusto 2019.

– Pri la LEA-Komitato: Sonĝo, nova reprezentanto de SATeK, iĝis membro de la diskutlisto de la LEA-Komitato.

– Dekmil proponis, ke ni pli ofte, regule kontribuu per artikoloj al la revuo *Sennaciulo*, oficiala organo de SAT.

– Sonĝo proponis, ke ni okazigu Someran Tendumon en la urbo Ulsan en junio 2019 inter koreaj kaj japanaj kamaradoj.

– KaraAn emfazis, ke ni devas disvastigi la SAT-movadon kaj, kompreneble, Esperanton al junaj aktivuloj.

Paz

# SAT-kunsido en Japanio




En la 13a de oktobro 2018 okazis SAT-fakkunsido en la Japana-Korea Komuna Esperanto-Kongreso. Ĉeestis 22 personoj, inkluzive ne-membrojn de SAT.

Raportis Nam Kyoyong el Koreio, Albert Stalin Garrido el Filipinoj kaj Suzuki Kazeto el Japanio pri sociaj movadoj en siaj landoj.

Pri organizaj aferoj, ni diskutis por refunkciigi la LEA-komitaton en Japanio. Suzuki Kazeto estis elektita kiel komitatano.

Kaj Miyazawa Naoto proponis okazigi SAT-kongreson en Japanio en estonteco, post 4 aŭ 5 jaroj. En urbo Osako (Osaka) ni havos eblecon por trovi taŭgan kongresejon. Sed tio ne estas fiksita.

Nakamura Daishin

# Pri la kongresejo



La kongresejo en Barcelono estos Martí Codolar. Temas pri bieno de la salesianoj, kiu havas ankaŭ ĝardenon, loĝejon, manĝejon, diversajn salonojn por kursoj, atelieroj kaj prelegoj. Ĝi lokiĝas en laborista kvartalo, bone konektita kun la urbocentro pere de metroo kaj busoj, sed ankaŭ proksime de la montaro. La manĝejo kaj parto de la loĝejo estas en modernisma konstruaĵo de la 19-a jarcento, kiun posedis burĝa familio. Tiu familio havis en sia ĝardeno vera bestoĝardeno. Nuntempe, oni kunlaboras kun pluraj sociaj institucioj kaj asocioj, inkluzive de la Ruĝa Kruco, kiuj ne nur kunvenas tie, sed ankaŭ uzas ĝin kiel rifuĝejon por bezonantaj homoj.

Indas rezervi kiel eble plej baldaŭ la loĝadon ĉar kelkaj loĝebloj baldaŭ elĉerpiĝos!









